

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Planlingvaj bibliotekoj
kaj novaj teknologioj

Argentino invitis UKon!

Kongresoj, seminarioj,
renkontiĝoj, kursoj...

Nur angle en Anglio

Kion eldoni en 2008?

La astrologia mapo de
Ludoviko Zamenhof

“La lasta rideto”
de Julian Modest

Rusa Antologio

La ludoj, kiujn ludas la
esperantistoj

Novaj libroj kaj revuoj

“Persone” torente



Decembro
2007

№12

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №12 (158)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la paĝo 23.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 700 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №12 (158).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 19 ноября 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

Ĉi-jare mi prelegis en kvar landoj pri la problemoj de la Esperanta gazetaro, kaj laŭ la reagoj de la aŭskultintoj mi konstatis, ke la gazetaro restas grava kolono de niaj movado kaj parolkomunumo, kaj do ankaŭ grava temo en *La Ondo*.

Mi jam skribis aliloke, ke, foliumante niajn revuojn, oni vidas, ke la esperantistaro estas literaturema — en la eta komunumo aperas kelkaj kulturaj revuoj, sed nur unu ĝenerala magazino *Monato*, kaj neniu gazeto sporta, turisma, filma, teatra, muzika, erotika, neniu modrevuo, neniu revuo pri komputiloj, pri aŭtoj, pri ĝardenoj, pri fiŝado, neniu reklamgazeto ktp. Tiaj gazetoj nacilingvaj kutime estas pli oftaj ol unumonataj kaj ili estas aĉetataj en kioskoj, sed ne abonataj. Esperantistoj preferas legi pri tiaj temoj nacilingve, ne en Esperanto. Sed ni abonas Esperanto-gazetojn por legi tekstojn priesperantajn kaj ... literaturajn.

Ĉu io nova en tiu sfero?

La unua *Beletra Almanako*, vaste antaŭanoncita kaj senpacience atendita, ne trompis la esperojn. Nun ankaŭ Esperantujo havas “dikan” kultureman revuon, en kiu jam aperas — apud poemoj kaj noveloj — pli ampleksaj verkoj fikciaj kaj nefikciaj.

Beletra Almanako, laŭ ties ĉefredaktoro, aperis sekve de la stagno. La stagno provokis la paŭzo de *Fonto*. Sed *Fonto* baldaŭ reaperos danke al mecenato, kaj post la renaskiĝo ĝi havos problemojn ne nur pro tio, ke *BA* reprenis ĝian privilegion publikigi verkojn premiitajn en la Belartaj Konkursoj de UEA, sed ankaŭ pro la ĵusnaskita *La Karavelo* — literatura ret-revuo, evidente baldaŭ ankaŭ papera, eldonata en Portugallingvujo, la baza lingvujo de *Fonto*.

Nova nemovada gazeto aperos venont-jare ankaŭ en Pollando. *Pola Esperantisto*, iniciatita kiel komuna gazeto por la polaj esperantistoj, donis ĉiam pli da atento al la literaturo kaj historio, ol al la movad-organizo, pri kiu grave diverĝis la konceptoj de la eldonanto (eldonejo *Hejme*) kaj de la landa asocio (PEA). La solvo estis trovita — PEA reprenos plene *Polan Esperantiston*, kaj la antaŭa eldonanto kun kelkaj kunlaborantoj aperigos soci-kultureman kvaronjaran revuon *Spegulo*.

Ni deziras sukcesojn al la menciitaj gazetoj, ankaŭ al la plu aperantaj *Literatura Foiro* kaj *La Gazeto*.

Kaj *La Ondo*? Ĝi restos principe tia, kia ĝi estas — internacia sendependa magazino en Esperanto — sed ankaŭ ĝi ne evitos ŝanĝetojn. Ĉi-kajere vi legos la rezulton de nia unua “ekspresa enketo” (pĝ. 11), kaj en januaro startos nova artikol-serio, kiu aperados ĉiumonate dum la tuta jaro.

Sed por decidi, kion ŝanĝi kaj kion restigi, ni devas scii la bezonojn de la legantaro. Kun ĉi tiu kajero vi ricevas demandilon, kompilitan de Jukka Pietiläinen. Bonvolu pleniĝi kaj respondi ĝin (ĝi aperos ankaŭ en la reto). Viaj respondoj multe helpos nin, ja ni eldonas la revuon ne por ni mem, sed *por vi*. Helpu do fari *vian* revuon pli interesa kaj pli vaste legata!

Ĝis la rerenkonto en la jaro 2008!

AIKO

Sur la kovrilpaĝo estas renovigita busto de Zamenhof en Zaozhuang (pĝ. 6), kiu, same kiel la recenzo de Walter Ŝelazny (pĝ. 18) kaj la astrologia mapo el Brazilo (pĝ. 13) memorigas pri la Zamenhofa Tago — la Tago de la Esperanto-Libro. (*Fotis Augusto Casquero*)

Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj

Sub gvido de Herbert Mayer, la direktoro de la Kolekto Planlingvoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko, okazis 19–20 okt 2007 en Vieno kolokvo *Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj*.

La historia edificio de la Aŭstria Nacia Biblioteko estas interne ekipita per modernaj deponejoj, liftoj kaj prelegejoj. La ekspozicio de Esperanto-muzeo troviĝas en la teretaĝo, la prelegoj realiĝis du etaĝojn pli supre. Ĉiuj prelegoj estis ilustritaj per lumbildoj.

Herbert Mayer (“Tradicia biblioteko — kaj defioj de novaj teknologioj: La Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko”) priskribis la historion de la Esperanto-muzeo ekde la fondo fare de Hugo Steiner en 1928, tra malfacila periodo de la dua mondmilito kaj postmilita reviviĝo ĝis la nuntempa profesi-nivela prilaborado de ĉiu materialo. La modernaj teknologioj ebligas pietatan traktadon de ĉiu libro, gazeto, manuskripto, foto, filmo aŭ alia deponaĵo en klimatizitaj deponejoj, tial la viena muzeo estas taŭga kolekto de literaturaj heredaĵoj post gravaj esperantistoj. Fine li menciis projektojn, kiuj ebligas prezenti en la reto arkivitajn fotojn (jam 2 mil) kaj inkunablojn (unuajn librojn ĝis la jaro 1900).

Detlev Blanke (“Planlingvaj arkiivoj — problemoj kaj praktikaj spertoj”) la iniciatinto de la kolokvo, priskribis problemojn de planlingvaj arkiivoj, kiuj klopodas konservi nelibrajn materialojn, ofte unuekzemplajn unikaĵojn, por ke ili ne perdiĝu post la morto de la prizorganto, nek estu detruitaj de ŝimo, putrado aŭ amatoreca traktado.

Utho Maier kaj Karl Heinz Schaefer (“La Germana Esperanto-Biblioteko Aalen hieraŭ, hodiaŭ kaj kio morgaŭ?”) klarigis, kiamaniere efektivigi enkomputiligado de la katalogo de la biblioteko en Aalen, kiu nun estas trovebla en la reto.

Christian Cimpa (“La daten-bankoj de La Kolekto Por Planlingvoj / Skandaj kaj digitalizaj projektoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko”) prezentis precipe la projekton de skanado de fotoj, kiuj nun estas disponeblaj en la reto. Ĉiun foton aŭ alian objekton (ekz. insignon) oni fotas nur unufoje (la fulmo malutilas ilin), sed poste ĉiuj intereso-atoj povas ilin vidi sur sia ekrano kaj ne damaĝi la raran originalon. Kiu


deziras pli kvalitan foton, povas aĉeti ĝin rete.

Árpád Máthé (“Periodaĵoj en bibliotekoj kaj libraroj”) klopodas kompili katalogon de ĉiuj periodaĵoj, kiuj aperis en Esperantujo (inkluzive de ĉiuj klubaj bultenoj kaj informiloj) kaj eldoni ĝin libroforme, nekomplete ankaŭ komputile (por ne senvalorigi la eldonotan libron kiel varon).

Reinhard Hauptenthal (“La planlingvo Volapük en arkivoj kaj bibliotekoj”) opinias, ke necesas fari similan katalogon pri ĉiuj volapukaĵoj. Kvankam Volapukon li konsideras finita afero, tiu lingvo apartenas al la komencoj de nia movado, do esplori ĝin estas kvazaŭ interlingvistika arkeologio.

Miroslav Malovec (“Esperanto-bibliotekoj en Ĉeĥio kaj disponigo de libroj per elektroniko”) prezentis la tri plej grandajn Esperanto-kolektojn en Ĉeĥio (Česká Třebová, Brno, Vracov), montris, kiel estas Esperanto reprezentita en grandaj publikaj bibliotekoj kaj fine atentigis, ke la Eŭropa Komisiono en 2005 alvokis al kreado de virtualaj bibliotekoj en ĉiuj lingvoj. Oni planas disponigi en la reto tekstojn de milionoj da libroj, do estus katastrofo por nia movado, se Esperanto ne estus reprezentita samkvalite kiel la aliaj lingvoj.

Marek Blahuš (“Propono pri starigo de interreta superkatalogo kaj cifereca arĥivo de Esperanto-literaturo”) priskribis la junularan projekton *Bretaro*, kies unua celo estas krei superkatalogon de ĉiuj ekzistantaj Esperanto-publikaĵoj.



Toon Witkam (“Provlegado post Skanado — Homo kaj teknologio”) montris per ekzemploj, kiamaniere oni skanas tekstojn, deĉifras ilin per OCR-programo, korektas la erarojn de la maŝino kaj poste klopodas imiti plej fidele la originan tekston klasike kompostitan, por ke la elektronika versio laŭeble proskimiĝu al la originalo.

Ljubomir Trifončovski (“La bibliotekoj — ĉu nur deponejoj?”) plendis, ke kvankam en la klubaj bibliotekoj ofte troviĝas raraĵoj, la membraro preskaŭ ne legas kaj ne uzas ilin. La prelego vekis viglan reagon de Mayer, ke laŭ lia opinio kiel arkivo de raraĵoj devas servi profesiaj muzeoj, sed la klubaj bibliotekoj havas alian taskon: eduki legantojn de la esperantlingva literaturo. Tial li rekomendas, ke la kluboj tenu aparte belajn, modernajn librojn, kiuj povas vekigi legemon de la klubanoj, dum la historiaj arkivaĵoj restu en deponejo nur por fakaj esploraj celoj.

Barbara Pietrzak (“Sonarkivo de la Esperanto-redakcio de Pola Radio”) skizis la problemojn, kiel arkivi la sonregistraĵojn, kiuj estas en la arkivo de Pola Radio. Neniu materialo estas eterna, la sonbendoj rompiĝas aŭ alie perdas sian kvaliton. La savon oni vidas en ciferecigo de la arkivitaj materialoj.

Post la lasta prelego disvolviĝis diskuto, en kiu estis proponite prepari la prelegaron libroforme sub redakto de Detlev Blanke.

Miroslav Malovec

Inter la cent inkunabloj, konsulteblaj en la retejo de la Viena muzeo, estas raraĵoj, ekzemple, la libro de Einstein el la jaro 1888 (ĉi-maldekstre).



UEA kaj ILEI ĉe Unesko

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unesko ekde 1954, ĉeestis la 34an Ĝeneralan Konferencon de Unesko en Parizo (16 okt — 3 nov 2007) kiel observanto. La delegitoj de UEA estis la vicprezidanto pri eksteraj rilatoj Ranieri Clerici kaj la konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe la Pariza sidejo de Unesko Renée Triolle kaj Barbara Despiny. La esperantistan partoprenon en la Unesko-konferenco plifortigas ankaŭ la observantoj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) Jean-Pierre Boulet, Monique Arnaud kaj François Lo Jacomo.

Lige kun la Ĝenerala Konferenco 25 okt okazis Internacia Forumo de Civila Socio. Flanke de UEA partoprenis Triolle kaj Despiny, flanke de ILEI Boulet. La publikan demandon de Renée Triolle al la ministro pri edukado de Jordano, kial la ministro parolis angle kaj ne en sia propra lingvo, tiu ĉi respondis, ke li “volis tuŝi pli grandan publikon”, sed poste li tamen parolis nur arabe.

La esperantistaj delegitoj efike utiligis la Konferencon kaj la Forumon por kontaktoj kun oficialuloj de Unesko kaj reprezentantoj de aliaj NRO-j. Ili disdonis informilojn pri Esperanto.

GK UEA

Nomumoj en la Centra Oficejo

Per decido de la Ĝenerala Direktoro de UEA du laborantoj de la Centra Oficejo de UEA baldaŭ transprenos novajn funkciojn. La rearanĝo fariĝis necesa pro la forpaso de la longtempa oficisto Marvin H. Stanley.

Ekde 1 nov la sekretario de la CO, Ralph Schmeits laboras en la librotena fako. Schmeits, kiu estas nederlandano kaj naskiĝis en 1979, estas oficisto de UEA ekde novembro 2005. La postenon de oficeja sekretario transprenos 1 dec Katarzyna Marciniak, kiu ekde novembro 2006 laboras kiel volontulo de TEJO. Ŝi estas el Pollando kaj naskiĝis en 1978.

GK UEA

IJK-64: la organizantoj laboras

26 jul – 2 aŭg 2007 okazos la 64a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en la romia hungara urbo Szombathely, proksime de la aŭstria landlimo.

Ĝi kunligos la tradicion de la IJK — ekzemple, gravajn debatojn en pleno kaj diskutrondojn (ĉefe pri la ĉeftemo “minoritataj rajtoj”) — kun la kutima juneca etoso, en kiu brilos sportoj, akvobatalo, dancoj, ekskursoj, naĝado ktp en la esperantista klimato de internacia amikeco sen lingvaj problemoj.

Preskaŭ urbocentre situas la studenta hejmaro, kiu gastigos la Kongreson. Tie la gepartoprenantoj povos trankvili kontraŭ la modera prezo de ĉ. 5 eŭroj je nokto.

11 nov en Budapeŝto okazis la unua organiza kunveno, en kiu ni cerbumis pri programeroj, decidis la tagon kaj la celojn de la tuttaga ekskurso, disdonis diversajn taskojn, raportis pri la ĝisnunaj okazintaĵoj kaj decidis dum du semajnoj pretigi kaj dissendi la pape-ran aliĝilon.

Por pliaj informoj vidu la retpaĝon <http://esperanto.net/ijk2008>, aŭ serĉu informojn en via plej ŝatata Esperantorevujo!

Acsádi Veronika

Pliaj ŝanĝoj en TEJO

Post la eksiĝo de la prezidanto, en TEJO eksiĝis ankaŭ la ĝenerala sekretario. Pro personaj okupoj, Valentina Sidorova ne plu povas servi kiel ĝenerala sekretario. Feliĉe, Anna-Laura Wickström (*vd. la foton*) konsentis plenumi la taskojn ĝis la venonta estrara elektado. Antaŭe ŝi estis komitatano de TEJO, estrarano de GEJ kaj komisiito de TEJO. Ŝi naskiĝis 21 jul 1980 en Svislando. Nun ŝi instruas matematikon en la universitato, kie ŝi doktoriĝas, kromstudas politikon, socion kaj lingvojn de Suda Azio.

Ni dankas al Kasia Marciniak pro ŝia laboro dum unu jaro kaj bonvenigas Julia Noe kiel volontulon en la CO en Roterdamo! Julia Noe eklernis Esperanton en 1998, en 2000–2006 ŝi estis estraranino por loka kaj landa agado en Germanio. Ekde 2001 ŝi estas en la organiza teamo de la Internacia Seminario. Ŝi studis en Stuttgart bibliotekajn rimedojn kaj metodojn kun ĉef-fako rimedoj kaj komunikado ĝis 2005. Poste ŝi studis kulturajn sciencojn en Frankfurto ĉe Odoro, Germanio.

www.tejo.org

Bona novaĵo el Vilno

Juozas Imbrasas, la urbestro de la litovia ĉefurbo Vilno, 9 nov 2007 akceptis la prezidanton de la Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas kaj la prezidanton de la Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio Audrys Antanaitis.

Ili interparolis pri atribuo de ejoj en la ĉefurbo por ambaŭ organizaĵoj kaj pri aliaj aktualaj demandoj de la komuna intereso. En la renkontiĝo partoprenis ankaŭ la prezidanto de la urba konsilia komitato pri ekonomio kaj financoj Gediminas Rudzionis kaj vicdirektoro de departemento pri proprieto de la urba administracio Vytautas Grinius.

Estis interkonsentite, ke la ejoj, nun okupataj de la Vilna filio de la Litova Esperanto-Asocio (strato Rotundo 5) estos uzablaj konstante.

Povilas Jegorovas

Esperanto en lingvotestado

Kultura Centro Esperantista fariĝis “institutional affiliate” (institucia aliĝinto) okaze de la ĵusa internacia konferenco de ALTE (Asocio de LingvoTestistoj Eŭropaj), al kiu estas deputita de la Konsilio de Eŭropo la apliko de la KEFR (Komuna Eŭropa Framo de Referenco).

En la konferenco ĉe la Universitato de Vilno, Esperanton reprezentis c-ano prof. Giorgio Silfer, kiu interalie kontribuas al la interna laborgrupo pri migrofluo kaj lingvopolitiko.

“KCE konstante progresas en la aplikado de KEFR, malgraŭ siaj limigitaj financaj rimedoj. Semajnon antaŭ la konferenco ĝi sukcese organizis la unuan ekzamenon laŭ la nivelo C1, kiun partoprenis tri kandidatoj en Svislando, — rimarkas prof. Silfer, laŭ kiu ne estas urĝe peti la definitivan membrecon de KCE en ALTE: — iam ni atingos antaŭ tion, sed unuavice KCE perfektigu la tutan LingvoTestan Sistemon de la Esperanta Civito; krome, la ALTE-kotizo estas tre alta: ĝi egalas ĉiujare al la monata salajro de la ĝenerala direktoro de UEA, kaj KCE preferu investu tioman sumon por la esperanta popolo en Afriko.”

HeKo

**Ne forgesu
reaboni!**

Argentino invitis UKon por 2012!

Ne valoras la penon raportari pri jar-sembleoj de asocioj, ĉar en assembleoj kunvenas ĉiam kutimaj komitatanoj kiuj raportas pri samaj aferoj antaŭ samaj grupetoj de partoprenintoj.

Tiel oni povas priskribi la 66an jar-sembleon de la Argentina Esperanto-Ligo (AEL). AEL estis fondita en la milita jaro 1941. Partoprenis en la stariĝo Tibor Sekelj, londona profesoro Wilfred Goodes, kaj aliaj rifuĝintoj tiam loĝantaj en la lando. En 1941 okazis la unua landa Esperanto-kongreso, kaj poste esperantistoj kutimis ĉiujare kongresi kaj kunveni en jara assembleo.

13 okt 2007 en la 66a assembleo komitatanoj reviziadis la staton de la landa movado, sia agado, novaj rondoj, ktp.

Oni dankeme menciis ĉeeston en la lando de Aneta Ubik, denaska esperantistino pola, kiu venis studi en la universitato de la urbo. Ŝi estas Cseh-instruistino de ILEI kaj multe helpas nun en instruado kaj disvastigo, ĉefe inter la junularo.

AEL sukcesis fondi *Esperantan Lernejon* jure registritan ĉe la edukaj instancoj de la Argentina Registaro. Do oni atendas ke ĝi helpos enirigi la lingvon en publikajn lernejojn.

AEL prenis du gravajn decidojn: kandidatiĝi por organizi la 97an Universalan Kongreson en Argentino en 2012 kaj fari eksterordinaran *Renkontiĝon 2008* en la venonta paska feriado, kun programo dediĉita al trejnado de Cseh-instruistoj.

Oni rimarkis pri la graveco profiti la reton por instruado kaj kontakto kun izolitaj esperantistoj, kun daŭriga plibonigo de nia centra paĝaro menciita de UEA en la lasta Jara Raporto. Ĉefe oni petas tre akurate atenti gelernantojn, kiuj pere de niaj tri kursoj en la reto emas rekte memstudadi.

La Ĉefdelegito informis pri la nova prezidanto de UEA, d-ro Probal Dasgupta, pri la novaj estraranoj, kaj pri iliaj unuaj mesaĝoj dum la 92 UK Jokohamo. Estis menciite, ke José Antonio Vergara, nova estrarano de UEA, kiu loĝas proksime de ni en Ĉilio, promesis viziti nin en la venonta renkontiĝo. Oni dankis la fondaĵon Canuto pro senpaga aliĝo de kelkaj junuloj al TEJO.

En la venonta jaro ni aliĝos al UEA-centjariĝa datreveno, al la Jaro de la Lingvoj de UN kaj al la 7a Tutamerika Kongreso de Esperanto en Kanado.

Roberto Sartor



Niaj bravaj argentinaj samideanoj invitas nin kongresi en Argentino en la jaro de la 125a jubileo de Esperanto.

Japeri: Kulturo per Esperanto

27 okt okazis la Unua Esperanta Posttagmezo de la urbo Japeri (elparolu Ĵaperi'). Ĝin kunorganizis Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE) kaj Niterói Esperanto-klubo (NITEK). Pli ol 50 esperantistoj kaj 150 studentoj partoprenis.

En Japeri, malriĉa urbeto 80 km de Rio-de-Ĵanejro, oni malofte organizas kulturajn eventojn. Tial la prezidanto de NITEK, Walter Rosa Fontes, decidis mobilizi la tiean socion por realigi allogan Esperanto-renkontiĝon kvazaŭ klerigan foiron. La urbestro apogis la iniciaton kaj disponigis kvin tendojn. La direktorino de la publika lernejo CIEP 207 permesis, ke la evento okazu tie. Lokaj religiaj aŭtoritatoj publike aprobis kaj benis la ideon.

KKE, NITEK, Esperanta Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono de Rio-de-Ĵanejro (EKOR), Legio de Bona Volo (LBV) kaj Eldonejo Lorenz okupis la tendojn por ekspozicii kaj vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Okazis ankaŭ paroladoj kaj artaj prezentadoj.

Dum sia prelego Walter Fontes emociiĝis, kiam li rememoris sian infanecon, kiam ne ekzistis elektra lumo en Japeri kaj la poŝtisto iris tien po unu fojo monate. Malgraŭ tio li eklernis Esperanton kaj komencis korespondadi kun eksterlandanoj. Tio mirigis eĉ la poŝtiston, kiu portis al li multajn leterojn el diversaj partoj de la mondo.

Laŭ la organizintoj, la Posttagmezo trafis la celon, nome alporti kulturon kaj civitanecon pere de Esperanto al la tiea komunumo. Pro la favora reago de la studentoj oni povas antaŭvidi, ke la renkontiĝo okazos en la venontaj jaroj.

Fabiano Henrique

En la centro de Kubo

Pli ol kvardek esperantistoj renkontiĝis 5–7 okt en la ĉarma kuba urbo Cienfuegos por la 6a renkontiĝo de la Centra Komisiono.

La renkontiĝo allogis esperantistojn ne nur el la centro de la lando, sed ankaŭ el Havano, per varia kaj riĉenhava programo konsistanta el prelegoj, debatoj, praktika leciono, artaĵoj kaj multaj ŝancoj por utiligi la lingvon.

La nacia estraro de Kuba Esperanto-Asocio estis reprezentita de ties prezidanto Julián Hernández Angulo, kiu parolis pri la 92a UK en Jokohamo, pri la nuntempo de la movado, kaj ankaŭ li gvidis tre ŝatatan praktikan lecionon; kaj de Norberto Díaz Guevara, sekretario pri informado, kiu konsilis pri “Kial kaj kiel korespondadi en Esperanto”.

Ricardo Salazar Crespo (Cascorro, Camagüey), honora membro de KEA, prezentis sian urbon per fotoj, informoj kaj vigla parolado. Roberto García Molina, gvidanto de la klubo en Cascorro, ekspoziciis pri la historio de Esperanto en sia urbo. Yoandra Isabel Rodríguez (Sancti Spiritus) prelegis pri la lingvo de la floro. José Campos (Pedro Betancourt, Matanzas) prezentis sian laboron pri esperantigo de bildstrioj. Albania Duthil, estraranino pri disvastigo, argumentis pri la temo “Esperanto estas ni mem”. María de los Ángeles González kaj Yoelvis Liaño, el la loka klubo, prezentis la urbon Cienfuegos per fotoj kaj historiaj detaloj.

La organiza teamo, gvidata de Barbara Borrell, prezidantino de la klubo, sindoneme kaj detale atentis eĉ plej malgrandan eron por garantii la glatan kaj sukcesan evoluon de la aranĝo.

Norberto Díaz Guevara



Al diverskultura komunumo

13–14 okt okazis la 39a Korea Kongreso de Esperanto en Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj, Seulo. Al la kongreso aliĝis 163 personoj, inkluzive de 11 eksterlandanoj el Francio, Svedio, Aŭstralio, Japanio kaj Ĉinio. La kongresa temo estis *La vojo al diverskultura komunumo*.

Dum la kongreso okazis fakaj kunsidoj: pri la Azia Kongreso en Hindio, pri la Esperanto-literaturo, la anoj de Espera Monto; funkciis rondoj de katolikoj, kristanoj kaj ŭonbulismanoj.

En la kongresa universitato prelegis d-ro Kawanishi Tetsuro (Japanio) pri la lastaj jaroj de Zamenhof kaj d-ro Lee Chong-Yeong pri la libro *Historio por Malfermi Estontecon* — komuna lernolibro pri la historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio, eldonita en la komuna lingvo fare de la trilandaj esperantistoj en julio.

Kadre de la kongreso okazis simpozio pri la kongresa temo, en kiu prelegis s-ro An Ĝong Su (Koreio) pri “Politiko en Koreio por enmigrintaj nekoreaj laboristoj”, profesoro Sandor Horvath (Aŭstralio) pri “Ĉu Koreio estas stranga?” kaj profesorino Birke Dockhorn (Germanio) pri “Vivo kiel fremdulo en Koreio”. Oni konkludis, ke ankoraŭ ne larĝas la vojo al diverskultura komunumo en Koreio.

Dum la kongreso d-ro Park Wha-Chong estis elektita kiel la nova prezidanto de KEA. D-ro Park, esperantisto de la jaro 1977, estas estro de la kliniko *Espero* en la urbo Pohang.

La kongreson oni reregardas kiel tre sukcesan, precipe pro la infana kurso, en kiu 22 geknaboj lernis Esperanton ludante kaj kantante per la lingvo sub la gvido de s-ino Bak Suhyeon.

Kim Uson

La kvara internacia en Azio

Ĝis la pasinta jaro en Azio estis tri internaciaj Esperanto-renkontiĝoj: Komuna Seminario inter ĉina, japana kaj korea junularoj; Himalaja Renkontiĝo en Nepalo; Internacia Kurskunveno inter Japanio kaj Koreio. Pasint-jare aldoniĝis la kvara — Internacia Festivalo de Esperanto en Zaozhuang (IFEZ), iniciatita de ĉinaj esperantistoj kunlabore kun Seula Esperanto-Kulturcentro el Koreio.

La dua IFEZ okazis 19–21 okt 2007 en Zaozhuang (provinco Shandong, Ĉinio). Kunvenis ĉ. 80 esperantistoj el Ĉinio kaj Koreio, kaj gasto el Hispanio. La programo entenis fotokonkurson kun ekspozicio en la loka universitato, viziton de fabriko, Granda Ĝardeno kaj Granda Kanalo, artajn aranĝojn kaj luksajn bankedojn.

Kadre de la kleriga programo oni aŭskultis prelegojn: *Muziko kaj danco por celebri Konfuceon* (prof Zou Aimin, Ĉinio); *Studo pri normigo de Vortaroj de Esperanto* (docento Ma Young-tae, Koreio); *Esperanto-movado en Azio kaj ĝia estonteco* (docento Lee Jung-kee, Koreio); *Konciza Ĉina Esperanto-Movado* (Wang Minhao, Ĉinio); *Nacia festivalo en Hispanio* (Augusto Casquero, Hispanio).

Reprezentanto de la universitato Zaozhuang diris, ke la universitato serioze konsideros enkonduki Esperanton kiel lern-objekton.

Ĉar la busto Zamenhof, starigita en la urba parko, pro la malalteco ofte estis difektita de buboj, okaze de IFEZ-2 oni reinaŭguris ĝin sur pli alta postamento.

Iom post iom IFEZ gajnos neatenditajn fruktojn kaj povus montri novstilan modelon de nia movado en Azio.

Lee Jung-kee

La plej malgranda dum 20 jaroj

La 94a Japania Esperanto-Kongreso okazis 26–28 okt 2007 en Minakami kun la temo “Kion azianoj atendas de Japanio? Kian rolon Japanio ludu en Azio?” kaj kun memore eldonita libro “Esperanto kaj mi — eseoj de 180 esperantistoj el 17 aziaj landoj”.

La unuaj du tagoj estis bedaŭrinde sub pluvo, sed la lasta tago estis serena, en intermonta distrikto, apud la klara fluo de la rivero Tone. El la 336 aliĝintoj 195 efektive venis en la kongresejon, nome la hotelo *Macu-no-i* kun varma fonto. Tiu ĉi nombro estas la plej malalta en la lastaj 20 jaroj, kredeble ĉar ĝi okazis post la grandega evento, la 92a UK en aŭgusto.

Dum la unua tago estis ekskursoj kaj kunsido de lokaj rondoj. Oni raportis, ke antaŭ/post la UK, alilandaj esperantistoj vizitis multajn lokajn rondojn.

Dum la dua tago antaŭtagmeze estis fakkunsidoj, kaj posttagmeze okazis la malfermo kun la ĉeesto de la urbestro de Minakami. Kaj poste estis prelegserio pri la kongresa temo:

1. Yu Tao (Ĉinio): *Historio de Azio kaj atendo al Japanio*;
2. Archana Joshi (Nepalo): *Esperanto-movado en progresantaj landoj kaj atendo al Japanio*;
3. Trinh Hong Hanh (Vjetnamio): *Junulara movado kaj atendo al Japanio*;
4. Hori Jasuo (Japanio): *La rolo de Japanio en Azia Esperanto-Movado*.

Dum la lasta tago antaŭtagmeze estis denove fakkunsidoj, el kiuj mi menciu nur du: Usui Hiroyuki prelegis pri William Auld kaj aliaj poetoj, kies pecojn li deklamis; prelegserio “Gunma kaj Esperanto” omaĝis al la esperantaj pioniroj devenantaj/agantaj en tiu ĉi distrikto.

Posttagmeze en Oratora Konkurso la Pokalon Yagi gajnis Amano Yayoi, kiu en la posta kunsido pri UK esprimis esperon iam gastigi IJK-n en Japanio. Sekvis kunsido “UK kaj poste”, en kio la LKK-anoj de la 92a UK resumis sian laboron, kaj tiu LKK estis fermita.

En la fermo oni honoris Miyosi Etsuo per Premio Ossaka pro la energia disvastigo de Esperanto. La literatura konkurso trovis gajninton de la dua Premio, Ono Tadahito, pro lia traduko *Promeso de Krizantemofloro* el la japana klasikaĵo *Ugetu-monogatari*. La kongresa flago estis transdonita al la sekvajara loko Wakayama, kaj fine estis kongresa koruso.

Sibayama Zyun’iti

Internacia Semajno ĉe marbordo

29 sep – 6 okt okazis la 15a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en la kataluna urbeto Tossa de Mar kun pli ol cent partoprenantoj el dek landoj. La pitoreskan urbon, kun tre belaj montaraj kaj maraj pejzaĝoj, dominas kastelo ĉe la roka marbordo. Vasta strando invitas al sunumado dum agrabla aŭtuna vetero.

En la inaŭguro bonvenigis nin Josep Colomer, la konsilanto pri kulturo, instruado kaj festoj de la urbo. Dum la du interkonaj vesperoj ni estis regaliĝintaj per ŝaŭmvino kaj frandaĵoj. Ĉiutage okazis Esperanto-kurso kiun sprite gvidis Miguel Gutiérrez Adúriz. A. Marco Botella prelegis pri Eŭropo en perspektivo. Li ankaŭ estis honorita per la premio Ada Sikorska-Fighiera pro siaj meritoj rilate al Esperanto. D-ro Árpád Máthé el Budapeŝto prelegis kaj prezentis la laboron de Rondo Takács omaĝe al Luis Hernández Izal kaj Ramón Molera. Komunikada ekologio estis temo por debato kun Wolfgang Gunther. Kun Luis Serrano Pérez oni debatis pri UEA laŭ ses proponitaj demandoj.

Dum urba promeno ni vizitis lokan muzeon kaj muzeon de la lumturo ĉe la supro de la kastelo. Por transdono de memortabulo pri la evento kelkaj ĉeestis akcepton en la urbodomo kaj tostis kun la urbestro, s-ino Imma Colom i Canal, per ŝaŭmvino.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la plej ampleksa fortreso en Eŭropo — Sant Ferran proksime al la franca landlimo. En Besalú ni rimarkis antikvan ponton kaj ĉe la lago Banyoles ni tagmanĝis. Dum ŝip-ekskurso ni laŭiris rokojn kaj eniris kelkajn grotojn. La travidebla fundo de la ŝipo ebligis observi fiŝojn kaj aliajn marbestojn. Dum la tria ekskurso ni vizitis preĝejon en antikva urbeto Castelló d'Ampuries kaj bus-promenis inter kanaloj en Ampuriabrava.

Vesperaj programoj koncernis kulturon. Ni spektis filmojn kaj operon sur vidbendoj. Neforgesebla estis la lasta folkloro vespero kun *Grupo Habaneras Montjuich*, kiu gajigis kaj regaligis nin per sentimentalaj kantoj. Dume oni pretigis por ni bongustan specialaĵon “Cremat”. Temas pri spicita kaj bruligita rumo, kiu instigas bonhumuron kaj dancemon. Dum la semajno funkciis libroservo, estis tempo por interbabilado, promenoj en la urbo kaj guado de ties proksima plaĝo kaj maro.

Liba Gabalda

Esperanto — edzperanto

Ĉiutage ĵurnaloj, televido kaj radio, bombadas nin per teruraj novaĵoj, kiuj pensigas nin, ke ĉio en la mondo estas malbona. Sed ne, de tempo al tempo venas al ni belaj, emociigaj, informoj.

En Ĉinio, kie ili loĝas, ĵus geedziĝis Michel Fontain, franca esperantisto, kaj Neĝeta, ĉina esperantistino.



Ili konatiĝis per Interreto, kie ili interbabilis kaj kune praktikis Esperanton. En 2004 Michel aliĝis al la UK en Pekino, kaj ili vidalvide povis konatiĝi kaj ekenamiĝis.

Burokrataj malfacilaĵoj flanke de Francio kaj de Ĉinio malpermesis ilin dum longa tempo realigi sian revon. Sed kun pacienco oni atingas ĉion. Kaj ili finfine sukcesis geedziĝi.

Ambaŭ estas konataj esperantistoj. Michel instruas nun Esperanton en Ĉinio al junaj gelernantoj. Same faras Neĝeta. Antaŭ nelonge mi havis la plezuron travivi kun ili tre interesan lernejan sperton. Nia lernejo, ISTK de Bydgoszcz (Pollando) kaj ilia lernejo en Ĉinio estis ligitaj pere de Skype, kaj la gelernantoj de tiuj du malproksimaj lernejoj kaj landoj povis interbabili en Esperanto. La ĉinaj gelernantoj povis vidi la polan flankon pere de granda ekrano, kaj la polaj nur en la ekrano de la komputilo. La sperto estis agrabla, amuza, motiviga por la partoprenantoj.

Multaj homoj demandas min: Ĉu Esperanto estas utila? Kaj mi demandas: Kion opinias pri tio la legantoj de ĉi tiu artikolo? Eternan feliĉon por Neĝeta kaj Michel.

Augusto Casquero



Pollando 27.12.2007 - 2.01.2008

Kulturtago 2007

En la Kulturtago 2007 de la Esperanto-Ligo de Malsupra Saksujo (EMAS) en salono de StadtHotel Oldenburg partoprenis dudek kvar germanoj, du nederlandanoj kaj du hungaroj. Estis reprezentitaj la malsuprasaksaj kluboj de Unterweser, Herzberg kaj Hameln kaj krome tiuj de Bremen kaj Groningen (Nederlando).

Unue la Herzberg-anoj Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy informis pri la aktuala Esperanto-agado en Herzberg: pri rilatoj kun esperantistoj en la pola ĝemelurbo Góra, pri Esperanto en lernejoj, pri kursoj kaj pri multaj aliaj atingiĝoj por kaj per Esperanto en Herzberg. En ĉi tiu Esperanto-urbo danke al la agado de la tieaj esperantistoj Esperanto ĝuas la subtenon de la urbestro kaj de ĉiuj partioj reprezentitaj en la urba administracio. Sekvis prelego de Uwe Joachim Moritz pri Oldenburg(i)o, t.e. pri la urbo kaj iama lando. Li ankaŭ informis pri la Oldenburg(i)a Esperanto-vivo.

La partoprenantoj havis la eblon akiri broŝurojn k.s. pri Herzberg, Esperanto-artikolojn kaj librojn (iujn malnovajn librojn eĉ senkoste). Krome en aparta salono kelkaj kulturtag-organizantoj per germanlingva prelego kaj ekspoziciaj libroj kaj revuoj informis pri Esperanto vizitantojn, kiuj pri ĝi interesiĝas kaj estis legintaj anoncojn pri la kulturtago en la loka gazetaro. Laŭ la “eĥo” oni eĉ povas aŭdace konjekti, ke en Oldenburgo estas okazonta nova Esperanto-kurso! (Sed ni ne ĝoju tro frue.)

Post la bongusta tagmanĝo okazis la jarĉefkunveno de EMAS. Rezultato de la elektoj: prezidanto: Thomas Heberlein; vic-prezidanto: Gerhard Weber; kasisto: Peter Zilvar; aseroj: Robert Weemeyer, Udo-Eugen Klingenberg, d-ro Klaus Schlüter kaj Heinz-Wilhelm Sprick. La aranĝo finiĝis per prelego de Harald Schicke, prezidanto de Internacia Naturkuraca Asocio, pri “Konsideroj de naturkuracisto pri la trinkaĵoj de niaj najbaroj”. En ĝi li klarigis la sanajn kaj ne-sanajn ecojn de akvo, kafo, teo, fruktosuko, limonado, bionado, vino kaj — plej detale, ĉar tio estas lia specialaĵo — biero.

Elkoran dankon al la organizantoj, precipe al Alke Geveke, Anne Hoepken kaj Brigitte Kranz de Esperanto-Gruppe Unterweser kaj Thomas Heberlein de Esperanto-Grupo Hameln.

Andreas Kück, Klaus Schlüter



PSKK: ne nur Klaĉkunveno

La PostSomera Klaĉkunveno estas la aŭtuna renkontiĝo de FLEJA (Flandra Esperantista Junulara Asocio). Kio en la jaro 1996 komenciĝis kiel komuna aranĝo de la nederlanda kaj flandra Esperanto-junularaj asocioj kun dudeko da partoprenantoj, en 2007 kreskis ĝis profesie organizita familia aranĝo. PSKK okazis en Halen de 31 okt ĝis 2 nov. Preskaŭ 80 diverslandanoj ĉeestis la escepte longan PSKK-on.

La hungara lingvistino Katalin Kováts gvidis aktivigan kaj paroligan porprogresantan kurson. Ŝi ankaŭ prelegis pri utilaj, konsilindaj lerniloj, kaj pri sia retejo www.edukado.net.

Christoph Frank, germana profesia pupludanto, gvidis la infanteatraĵon *La eta sorĉistino*, en kiu la infanoj brile aktoriĝis, kaj prezentis magiaĵojn.

Dum la tuttaga ekskurso al Hasselt, ni matene vizitis la nacian juniperbrandan muzeon, kie la gvidistoj rakontis pri la historio kaj maniero produkti juniperbrandon. Poste la plenkreskuloj ricevis glason da juniperbrando por gustumi. Posttagmeze ĉiuj povis propra-iniciate viziti la urbon.

En la riĉa programo estis ankaŭ libroservo de la Flandra Esperanto-Ligo, manlaboro kaj sporto por infanoj, ornamado de la ejo por Haloveno, festado kaj dancado, tabloludoj, filmomontrado, salsa-danckurso...

22 okt 2007 en Senta forpasis

Szekeres Lajos (1927-2007)

trafikingeniero, esperantisto de 1948, propagandis la lingvon inter jugoslavaj fervojistoj, multe instruis, publikigis Esperanto-kurson en fervojistaj gazetoj, prezidis fak-asociacion JAFE, kunlaboris en la terminara komisiono de IFEF; en 2000 en Senta (Vojdovido, Serbio) aperis lia Esperanto-lernolibro.

Maldekstre: Carsten kaj Ruĝa dum PSKK promociis la Ago-Semajnon en Malbork (Fotis Yves Nevelsteen).

Dekstre: prezidantino Hedwig Fischer alparolas la kunvenintojn en Münster (Fotis Ziko van Dijk).

Vizitis nin reprezentantoj de la pola klubo *Varsovia Vento*, kun kiu ni kunlaboras kaj interŝanĝas spertojn. Ideo estas iom post iom krei internacian teamon de organizantoj de renkontiĝoj, por labori sinergie, lerni unu de la alia kaj helpi pri praktikajtoj.

Venontjare PSKK okazos en Zutendaal, kie ni havis bonajn spertojn en 2005. Post kelkaj jaroj, dum kiuj Haloveno estis la temo de la aranĝo, venontjare la temo estos Saveno, la unua tago de la jaro kaj samtempe sankta tago de mortintoj en kelta tradicio. Ĝi estas la antaŭulo de la moderna Haloveno.

Yves Nevelsteen kaj Heidi Goes

GRUPE-11

La 11a Glivice-a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto (GRUPE) kunvenigis 10–11 nov en Gliwice (Supra Silezio, Pollando) pli ol 50 grupemulojn el Pollando, Ĉeĥio, Slovakio kaj Germanio.

Post la malfermo, kiun ĉeestis urbestarano, komenciĝis la programo, kiu estis tradicie kleriga. La temoj estis: Afriko (Gerhard Hirschman), La lingvo de la korpo (Antoni Tabacki), IKUE (Miloslav Švaček), UK-82 en Jokohamo (Aleksander Zdechlik), Esperanto en Pollando (Halina Komar kaj Robert Kamiński), Lingvaj problemoj en EU (Stanisław Mandrak), Mondcivitanoj (Gerhard Hirschman).

La nova prezidantino de PEA, Halina Komar, diskutigis la partoprenantojn pri la estonteco de la pola Esperantujo, kaj la eksprezidanto, Stanisław Mandrak, diskonigis la rektan metodon de Esperanto-instruado.

Andreo Sochacki

Esperanto inter najbaroj

[FEN-X] Faulhaber*-semajnfinoj estis organizataj en Nederlando dum multaj jaroj. Dum la lastaj jaroj ĉiam malpli da partoprenantoj venis en la aŭtuno al la konferenceto Mennorode. Niaj najbaroj, la germanaj esperantistoj en Münster, proponis komune festi la centjariĝon de Esperanto en tiu urbo.

Rezulte do, Kultura semajnfino *Esperanto inter najbaroj* gastigis 19–21 okt 2007 en la Junulara klerigejo de la urbeto Nordwalde apud Münster 81



esperantistojn, inter ili 37 nederlandanojn.

La vendredan programon malfermis Hedwig Fischer, prezidantino de Esperanto-Societo Monastera, per bonvenigaj vortoj, kiujn tuj respondis la prezidantino de *Esperanto Nederland*, Ans Bakker-ten Hagen.

D-ro Rudolf Fischer kondukis nin al la pratempo, montrante fotojn ekde 22 okt 1907, kiam kelkaj gimnazianoj fondis Junularan Esperanto-Klubon. Trafoliumante kun ni la albumon, d-ro Fischer plurfoje menciis ke la junuloj, kiuj tiam aktivis por Esperanto, finis sian junan vivon post nemultaj jaroj en la Unua Mondmilito.

Post ĉi tiu retrorigardo al junulara fervoro sekvis kontrasto kaj samtempe similaĵo: du junaj muzikistoj, Gunnar Fischer kaj Sebastian Hoffmann, kantis en Esperanto pop-stile.

La matenon de sabato Ziko van Dijk jonglis per historiaj faktoj kaj epizodoj por reliefigi la 30-jaran militon kiu finiĝis per packontrakto elnegocita kaj fine subskribita en Münster en la jaro 1648. Ed Borsboom ridigis la aŭskultantojn montrante kiel arbitra estas la pasporto.

Posttagmeze la urbo Münster montris al ni siajn trezorojn. La amuza programo atingis sian klimakson en la sabata vespero, kiam folklora vira kanthoro prezentis kantojn en la regiona lingvo kaj en Esperanto.

Dimanĉe Nora Caragea traflugis kun ni kelkajn librojn kiujn ŝi mem tradukis. Sed venis la horo por adiaŭo.

Hans Bakker

* **Frederiko Antonio Francisko Faulhaber** (1893–1979), nederlandano, esp-isto ekde 1912, prezidanto de Federacio de Laboristaj Esperantistoj (1927–1938), eldonanto de *La Progresanto* (1934–1958), aŭtoro de deko da libroj. (LOdE)

Estas intereso, ne klasĉambroj

La Asocio de Esperanto en Burundio disponigis tri instruistojn (Léonard, Eric kaj Elysée) por instrui Esperanton en la nacia universitato. Ĉiuj instruistoj estas studentoj en diversaj fakultatoj de ĉi tiu universitato.

Entute 172 studentoj enskribiĝis por la kurso, kaj jam 52 havas bazan gramatikajn pri Esperanto. Aliaj (novaliĝintaj) studentoj ankoraŭ ne eklernis pro manko de klasĉambroj. Alia fakto estas ke novaj studentoj ne loĝas en la universitato. Por tiuj, kiuj loĝas en la universitato, la kurso okazas merkrede kaj vendrede vespere kaj sabate frumatene (de la 7a ĝis la 8a).

Ni interesigu tiujn junulojn, disponigante al ili materialon, ĉar post la studado ili laboros diversloke kaj ĉie ili povos semi Esperanton.

Sabiyumva Jérémie

Nova Esperanto-hotelo Diana

Post 17 jaroj en Bulgario denove estas Esperanto-hotelo sur la bordo de la Nigra Maro, nur je 9 kilometroj de la fama bulgara mara urbo Burgas.

En la hotelo *Diana* okazos Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, internaciaj Esperanto-konferencoj kaj seminarioj, konversaciaj rondoj, kursoj pri originala Esperanto-literaturo kaj historio de Esperanto-movado, renkontiĝoj kun famaj Esperanto-verkistoj kaj sciencistoj, ekskursoj tra la pitoreska bordo de la Nigra Maro.

La eleganta hotelo estas je 100 metroj de la belega plaĝo, kies ora sablo logas ripozantojn el la tuta mondo. En la hotelo estas komfortaj du- kaj tri-litaj ĉambroj, en kiuj estas banĉambro, televidilo, fridujo kaj ĉio necesa por agrabla ripozo.

La geesperantistoj, kiuj deziras ripozi en la Esperanto-hotelo, estos atendataj ĉe la flughaveno en Burgas kaj poste buse oni veturigos ilin al la hotelo, kaj post la ripozo same buse ili estos veturigotaj reen al la flughaveno.

Por la geesperantistoj el diversaj eŭropaj landoj estas rabato. De 1 jun ĝis 15 jul dulita ĉambro kostas nur 20 eŭrojn. De 15 jul ĝis 15 sep dulita ĉambro kostas nur 25 eŭrojn. La posedantoj de la hotelo parolas ankaŭ la anglan lingvon.

Stratadreso: Burgas, kv. Krajmorie, str. Ĉernomorka 9; ☎ 056 89-10-10; GSM: 0877-46-41-88, 0889-137-555; ✉ modest@abv.bg.

Vigla instruado en Liaoning

Vastiĝas universitata instruado de Esperanto en la ĉina provinco Liaoning.

Aldone al pli ol 500 ĉi-semestraj ekstudentoj (vd. *LOdE-157*, pĝ. 10) 85 studentoj el Shenyang Muzika Universitato 17 okt 2007 elektis Esperanton kiel nedevegigan studobjekton kaj eklernis ĝin en du grupoj. Laŭ la lernolibro *Esperanto-Kurso de La Nova Jarcento* instruas f-ino Mu Chunlei, vic-ĝenerala sekretariino de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio.

Ŝia instru-metodo, nomata reciproka movado, estas tre ŝatata de studentoj. Laŭ la reciproka movado parto de lecionoj okazas ekster la klasoĉambroj; la studentoj unue faras demandojn pri ĉirkaŭaĵoj, poste ŝi instruas ilin esprimi la demandojn kaj respondojn en Esperanto. Ŝi partoprenis en la 92a UK en Jokohamo.

Wu Guojiang

Spirala vojo de Esperanto

En la universitatoj de Strasburgo (Francio), kiel en multaj eŭropaj universitatoj, regas la angla kiel ĉeflernata lingvo, kun grava ĉesto de la germana pro la proksimeco de la germana landlimo.


Por ebligi al strasburgaj gestudentoj plurlingvaniĝi, la tri urbaj universitatoj antaŭ kelkaj jaroj kreis la lingvo-centron SPIRAL, kie universitatanoj povas lerni dudekon da lingvoj.

Post kvar jaroj da klopodado, lokaj esperantistoj finfine sukcesis enkonduki Esperanton en tiun lingvo-centron. La unuaj gestudentoj povos eklerni Esperanton ekde 1 okt, kiam la lingvo-centro malfermiĝos.

Venontjare la tri universitatoj de Strasburgo kunfandiĝos kiel Eŭropa Universitato de Strasburgo. Kiel bele estas, ke Esperanto lerneblas en la “eŭropa” universitato!

Laŭ Eŭropa Bulteno

Esperanto-hotelo *Diana*



Unufraze

★ Prezidento de Kroatio Stjepan Mesić akceptis ĝeneralan aŭspicion de la Centjariĝo de Eo en Kroatio k promesis partopreni en la jubilea kunveno fine de 2008. (*Zagreba Esperantisto*)

★ Svisaj parlamentanoj Gisøle Ory k Francine John-Calame proponis UEA por la pacpremio Nobel en 2008. (SES)

★ 14-16 sep E-ista Laborista Federacio (FET), SAT, SAT-Amikaro k kelkaj aliaj francaj E-asocioj partoprenis en la *Homara Festo* de la Komunista Partio Franca k de la gazeto *L'Humanité* per propra budo, ĉe kiu kvin mil E-informiloj estis disdonitaj. (*La Sago*)

★ Estelle Loiseau k Gregor Hinker reprezentis TEJOn en la 5a Junulara Forumo de Unesko (12-13 okt, Parizo) k informis pri Eo k TEJO ĉe informbudo. (www.tejo.org)

★ Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj (ILEI) estas inter 37 neregistaraj organizaĵoj, kiuj perdis sian oficialan statuson ĉe Unesko pro neresendado de demandiloj. (Liberia Folio)

★ Eŭska e-isto Aitor Arana Luzuriaga ricevis ĉi-jaran literaturan premion *Baporea* pro la romano *Senmorteco*. (*Heroldo de Esperanto*)

★ E-stando funkciis 8-9 sep en la kultura/libertempa festivalo en la norvega urbo Hemnes; E-ekspozicio estis aranĝita 17-30 sep en Trondheim; kelkfoje E-libroj estis ekspoziciitaj en la ĉefbiblioteko de Oslo. (*Norvega Esperantisto*)

★ Estrarano de Kuba E-Asocio, Maritza Gutiérrez González, prelegis pri Eo kiel alternativo fronte al la nuntempa maljusta lingva k komunika ordo en la tradicia kuba Festo de Nacieco, 17-20 okt, Bayamo. (Landa Agado)

★ E-klubo *Solidareco* en la rifuĝejo Bitale perdis sep anojn pro la milito en Kongolando. (*Heroldo de Esperanto*)

★ En novembro en la Jagelona Universitato en Krakovo (Pollando) komenciĝas du-semestra supera kurso de Eo, kiun gvidas Maria Majerczak. (M.M.)

★ Grupo da katalunaj e-istoj iniciatis kampanjon por ke UEA nuligu la altan protektantecon de Francisco Franco en la 53a UK en Madrido, 1968. (www.homadigno.net)

★ E-societoj en Beogrado (Serbio) k Ĉikago (Usono), kies urboj ĝemeliĝis antaŭ unu jaro, planas interŝanĝi informojn, organizi interkonajn k personajn kontaktojn, interŝanĝi librojn k esperantaĵojn, k partopreni en interurba kunlaboro. (Landa Agado)

Nurangla edukado en Anglio*



Vide el Bruselo. “Ni sentas, ke instruistoj havas iom negativan sintenon al modernaj fremdlingvoj. Instruistoj kaj lernejestroj ne promocias lingvojn. Niaj streboj estas nuligitaj de aliaj”, — diras instruisto de lernejo el orienta Anglio en nova studo de la brita centro por lingvoj CILT.

La studo montras la malkreskon de intereso de angla-lingvanoj pri aliaj lingvoj. Nur 28,7% de anglaj lernejanoj studas por fari la GSCE-

ekzamenon de la franca (por 16-jaruloj) kompare al 54% en 2000. Nur unu el dek faros GSCE-ekzamenon por la germana. La nombro de la anglaj lernejanoj interesitaj pri fremdaj lingvoj komencis malkreski en 2004, kiam la registaro decidis ne devigi fremdajn lingvojn al lernejanoj pli ol 14-jaraj.

“Inter 2003 kaj 2007 la nombro de GSCE-ekzamenoj pri fremdaj lingvoj malkreskis de 453.900 al 301.400”, — agnoskis Jim Knight, ŝtatministro respondeca pri lernejoj. La nura bona novaĵo estis malgranda kresko de la nombro de lernejanoj kiuj elektis la ”facilan” lingvon de ferioj, la hispanan. Knight tamen laŭdas la strategion de la Nacia Lingva Strategio de la registaro, publikigitan en 2002. “La supera celo estas plibonigi la instruadon kaj lernadon de lingvoj en ĉiuj niveloj de edukado”, — diris Knight en la parlamento. Por fronti la daŭran malkreskon de lingvolernado post la aĝo 14 jaroj, la registaro starigis studgrupon.

“La registaro neniam devis ĉesigi la devigan instruadon de lingvoj je GSCE-nivelo (14–16-jaruloj), kiam ĝi promociis la lingvan lernadon en bazlernejoj, — diris liberala parlamentano David Laws. — Dum nur kvin jaroj ni iris de situacio, kie plimulto da junuloj faris ekzamenon pri eŭropaj lingvoj, ĝis situacio kie estas malpli ol duono. Ni havas malbonan reputacion eksterlande pro nelernado de aliaj lingvoj”. Laws akuzas ministrojn pro la krizo de lingvolernado.

Laws kredas, ke la kreskanta bezono je ĉiam pli bonaj notoj en la lernejo respondecas pri malemo de angloj lerni “malfacilajn” lingvojn. “Estas breĉo inter lingvaj riĉuloj kaj malriĉuloj, kiuj nur kreskos se lernejevduantoj ne strebos subteni siajn lingvaj departementojn”, — konkludis Duncan Byrne, prezidanto de la Asocio por Nuntempaj Lingvoj (en privataj lernejoj).

Dafydd ab Iago

* Statistiko pri Skotlando, Kimrio kaj Nord-Irlando dume ne estas publikigita.

Esperanto, ĉu lingvo por idiotoj?

Mi ricevis la lernolibron laŭ la Zagreba metodo. Sed mi devas diri al vi sincere — al mi ne plaĉis la kovrilo de la lernolibro. Lernolibro estas serioza libro por seriozaj homoj, kaj kovrilo devas esti serioza. Sed sur la kovrilo mi vidas ridetantaj duonkretenojn. Ĉu Esperanto estas lingvo por idiotoj? Almenaŭ laŭ la kovrilo oni povas kompreni tiel.

Mi volis donaci la lernolibron al mia filo, sed kun tia kovrilo mi ne riskas.

Anatolij Rezniĉenko (Ruslando)

Eklernu kaj riĉiĝu!

La ĝeneva grupo *La Stelo* lanĉis kun subteno de Svisa Esperanto-Societo konkurson por 100 homoj kiuj pretas lerni Esperanton dum la venontaj monatoj (<http://www.concours-esperanto.ch>):

«Kun la celo pruvi, ke Esperanto estas facile lernebla lingvo oni serĉas junulojn, kiuj ek de nun ĝis 15 mar 2008 provos lerni la lingvon per iu ajn rimedo: libroj, kursoj, interreto, privatinstruisto ktp. La premioj varias inter 500 kaj 3000 svisaj frankoj. Por partopreni oni devos sendi originalan 200-vortan tekston en Esperanto plej malfrue 15 mar 2008 kaj ekzameniĝi je fino de marto 2008».

Jam malmultajn tagojn post la lanĉo de la konkurso ni atingis cent aliĝojn! Do ni havas jam la 100 kandidatojn, kiuj nun studas la lingvon por partopreni en la premio. Daŭre venas pliaj interesuloj!

Oni jam nun povas paroli pri la plej sukcesa kampanjo okazinta por Esperanto en Svislando de post la tempo kiam Lidia Zamenhof en la 20-aj jaroj faris sian prelegvojaĝon!

Dietrich Weidmann (Svislando)

UK-94: nova televida projekto

En 2009 okazos la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko. Jam nun ni deziras komenci elsendi programojn en Esperanto per la interreta televido ITVC.

Nia celo estas doni gravajn informojn por esperantistoj ne nur el Bjalistoko, la naskiĝurbo de la kreinto de la internacia lingvo, sed ankaŭ el aliaj partoj de la mondo. Ni elsendos programojn pri esperantistoj, iliaj sukcesoj, kluba agado, kongresoj, renkontoj ktp. Ni prezentos la plej interesajn eldonaĵojn, Esperanto-teatrojn, muzikajn ensemblojn, filmojn kaj vizitindajn lokojn. Tial ni petas vin helpi realigi ĉi tiun entreprenon. Bonvolu sendi mallongajn filmajn raportojn, novajn eldonaĵojn kaj muzikaĵojn, kiuj povos esti senpage prezentitaj en la interreta televido.

Prezentado de la materialoj, recenzoj kaj popularigado de via agado estos ankaŭ promociado de Esperanto.

✉ BES, PL 15-282 Białystok, ul. Pękna 3, skr. pocz. 67, Polska — Pollando

📧 redakcja@itvc.pl

Stanislaw Dobrowolski (Pollando)

Leterkesto

Antaŭ 10 minutoj alvenis la novembro numero de *La Ondo*, kaj mi tuj trafolumis la enhavon kaj konstatis, ke vespere atendos min interesaj artikoloj kaj novaĵoj. Diversaj devigaj taskoj katenas min hodiaŭ. Des pli agrabla estos la ĝuo trankvile enprofundiĝi en la tekstojn de Via ŝatata revuo ĉe legolampo. Aparta ĝojo estis vidi nian karan amikon Atilio en la Urba Biblioteko de Turku en bela foto.

Jorma Ahomäki (Finnlando)

Bonorde mi ricevis la novembran kajeron kun la disko. La muziko plaĉis al mi, sed vortojn mi tute ne komprenis. Kion mi ne ŝatas en la revuo: *La mondo ridas*. La ŝercoj aspektas al mi delonge eluzitaj kaj ne dignaj de via revuo.

Louise Marin (Francio)

Mi vere miris, vidante, ke Esperanto vivas en mondo kaj en Rusio. Mi estas malnova esperantisto el jaro 1962, estis fanatiko, eĉ jam pensis en Esperanto. Eble iu volus skribi al mi: endel.pajula@mail.ee

Endel Pajula (Estonio)

Kion eldonistoj preparas por ni?

Ekspresa enketo de *La Ondo*

De tempo al tempo en *Trubuno* aperos “ekspresaj enketoj” pri temoj, interesaj por nia legantaro. La unua demando — *Kion vi planas eldoni antaŭ la Kongresa Sezono 2008?* — estis sendita al dudeko da plej konataj Esperanto-eldonejoj. Kelkaj ne respondis, du eldonejoj skribis ke ili ne deziras diskonigi siajn planojn, kaj rezulte ni aperigas dek unu respondojn, laŭ la alfabeto de la eldonej-nomoj.

Bero (Roterdamo, Nederlando) post la sukceso de *Ksenofobia gvidlibro al la italoj*, publikigita okaze de la UK en Florenco, eldonos, okaze de la UK en Roterdamo, *Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj*. Numero 5 en la serio “utopia”, *La dormanto vekigās* de H.G. Wells, estas preta kaj, plej probable, aperos antaŭ la UK. Ankaŭ numero 6, *1984* de George Orwell estas preskaŭ preta, sed ĝi ne povos aperi antaŭ la somero 2008. [Ionel Onet]

Espero (Partizánske, Slovakio) funkcias ekde 2003. Jam aperis 13 libroj, 1 DVD-Rom, 1 KD-ROM, 1 muzika KD. Eldonotaĵoj por unua duono 2008: KD-Romo *Elektronika vortaro Esperanto-slovaka* de Július Hauser, Ľubomír Fajth, Štefan R. Seemann, Eduard V. Tvarožek; DVD-video *Esperanto estas...* (kunlabore kun E@I); *Krucenigmoj* de Stano Marček; *1111 aforismoj kaj aliaj spritaĵoj* de Inĝ. Borský; *Lernu diligente* (ekzercoj, taskoj, ludoj, versaĵoj por progresintoj) de Danutė Vidrinskienė; *Taglibro de Neniofaranto* de Nicola Ruggiero; *Versoj de Persoj* (kolekto de originala Esperanto-poezio de persaj aŭtoroj eldonota por la Irana Esperanto-Asocio). [Peter Baláž]

Flandra Esperanto-Ligo (Antverpeno, Belgio) ekde sia fondo en 1978 eldonis kelkcenton da titoloj. Ĉe FEL estas en preparo: *Kronprincezdino*, romano de John Francis; *La vivo de Lidia Zamenhof, filino de Esperanto* de Wendy Heller; *Sub fremdaj ĉieloj*, nova poemaro de Edwin de Kock; Traduko de *Origino de Specioj* de Charles Darwin; *La talpoĉasisto*, romano de Stephan Lang (el la nederlanda); Nova romano de Anna Löwenstein; *La grafo de Montekristo* de Aleksandro Dumas en traduko de Daniël Moirand. [Paul Peeraerts]

Fonto (Brazilo) havas plurajn verkojn por (re)eldonado, sed nia mono elĉerpiĝis! Tamen la revuo *Fonto* revekiĝos en 2008, ĉar sin prezentis mecenato, kiu garantias, ke ni ne havos deficiton. Ĝis kiam?.. [Gersi Alfredo Bays]


Horizonto (Japanio) ne estas grava eldonejo. Mi faras ĉion, verkas, redaktas, desegnas, fotas, kaj fine pagas al la presejo. Ĝis nun mi eldonis kelkajn librojn, kaj venont-jare mi eldonos mian esearon en la japana lingvo *Esearo de mond-vojaĝanto s-ro Hori*. [Hori Yasuo]

Ĉe **Edition Iltis** (Malaucene, Francio) pretas por eldono ankoraŭ ĉi-jare: Schleyer-biografio de Rupert Kniele (german-lingva, el 1886, kun notoj kaj bibliografio de RH), Volapük-bibliografio de Johann Schmidt, kaj prelego de

R. Hauptenthal en Vieno (du-lingva). Krome estas prilaborata dokumento pri la ekesto de Ido el 1907. Poste, laŭ mia tempo mi editoros artikolojn pri Volapük de Schmidt kaj de Leopold Einstein. [Reinhard Hauptenthal]




KAVA-PECH (ĉeĥa mallongigo, kiu signifas “Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle”), fondita en 1992, aperigis 108 librojn, el ili preskaŭ duono tuŝas Esperanton. Almenaŭ tri titoloj jam maturiĝis ĝis tia grado, ke espereble nenio povas malhelpi ilian aperon antaŭ la Roterdama UK. Temas pri la verko de Jiří Laube *Ĉu integriĝo de Eŭropo? Nur per demokratia simbiozo de kulturoj*; la dua, aktualigita eldono de mia verketo *Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj*; kaj la libro de desegnitaj humuraĵoj fare de Pavel Rak. [Petro Chrdle]



Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop), fondita en Svislando en 1980, evoluis al plurfaceta eldonejo, produktanta ne nur periodaĵojn, sed ankaŭ librojn, kasedojn, diskojn, filmojn, kongresojn, ekspoziciojn ktp. LF-koop baldaŭ aperigos la ampleksigitan novan eldonon de *La familio Zamenhof* de Zofia Banet-Fornalowa. En preparo estas pluraj titoloj, plejparte didaktikaj, sed ni ne prognozas nun, kiuj estos prespretaj ĝis julio 2008. [Giorgio Silber]

Libro-Mondo (Pollando) fondiĝis en 1989. Antaŭ la Roterdama UK aperos *Reĝo Maĉjo* de Janusz Korczak; *Novaj vojoj, esearo pri Eŭropo, kia ĝi devus esti* de Hodler; *Vizio de juna virino kaj Kun Gandhi en Hindujo* de Privat (elfrancisigis J.P. Danvy); eseo pri karaimoj de Tomasz Chmielik. Estos fineldonitaj la franclingvaj artikoloj de Privat kun entute 36 mil paĝoj aperintaj en la svisa socialismema kaj kooperativa gazetararo. Progresegas laboroj pri la trivoluma *Pola Antologio*. [Tomasz Chmielik]



La novjorka **Mondial** planas eldoni 740-paĝan anglalingvan *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto 1887–2007* de Geoffrey Sutton. Ni krome eldonos du librojn de Wera Blanke (unu en la germana kaj angla kaj la alia en Esperanto) pri terminologiaj kaj lingvistikaj demandoj. Certe aldoniĝos fikciaj libroj, pri kiuj ni ankoraŭ ne findecidis. Krome **Mondial** eldonos en marto la duan kajeron de sia *Beletra Almanako*. [Ulrich Becker]



Sezonoj (Kaliningrado, Ruslando) planas eldoni romanon de Jules Verne *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj* (traduko de J.L. Tortel), novelaron de Borges *La sekreta miraklo* (pluraj tradukantoj), ambaŭ en la serio *Mondliteraturo*; estas pretigata konciza enciklopedio pri eminentaj esperantistoj en la serio *Scio*. Krome aperos kelkaj broŝuroj, i.a. pri Tolkien. [Halina Gorecka]

Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (4)



kod/o 1 Sistemo de signoj aŭ signaloj por prezenti mesaĝojn aŭ ordonojn: *internacia marista signalkodo; Morsa kodo; sepbita kodo; gena kodo; ĉifro estas sekreta kodo.* **2** Kodaĵo: *poŝta kodo; UEA-kodo; fonta kodo de programo* (= fonta teksto de programo). **kod/i.** Esprimi ion en kodo *1: kodi mesaĝon.* **mal/kod/i.** Ekstrakti informon el koditaĵo: *malkodi sendaĵon.* **kod/aĵ/o.** Grupo da signoj, prezentanta koditan informon.

[Noto. La Akademio lasas por posta konsidero la demandon, ĉu la juran sencon “sistema normodona dokumento pri iu branĉo de socia aŭ faka vivo” oni esprimu per la vorto *kodo* (kio konformus al la rekomendo de la aŭtoritataj vortaroj kaj al la uzado de plimulto, sed malkoheras kun la signosistema senco), aŭ per *kodekso* (uzata malpli ofte, sed pli kohere kun la ĉefsenco).]

kodeks/o. Libro, precipe antikva manuskripto, el falditaj kaj binditaj folioj (kontraste al libro rulforma).

[Noto. En multaj lingvoj per natura sencovastigo (*kodekso, entenanta la leĝaron de Justiniano — la Kodekso de Justiniano*) la vorto *kodekso* akiris la sencon “kohera normodona dokumento pri iu branĉo de socia aŭ faka vivo”: *civila kodekso; mara kodekso; honor-kodekso.* Tia uzo estas atestita ankaŭ en Esperanto, tamen ĝi restas konsiderinde malpli ofta ol la homonima uzo de la samdevena vorto *kodo*.]

koher/a 1 (pri tuto) Tia, ke ĉiuj ĝiaj partoj estas konsekvence, logike, harmonie k.s. interligitaj aŭ interrilatantaj. **2** (pri parto de tuto) Tia, ke ĝi konsekvence, logike, harmonie k.s. interligiĝas aŭ interrilatas kun la aliaj partoj de la tuto. **koher/i 1** Esti kohera: *siaj ideoj koheras; tiu parto ne koheras kun la resto.* **2** (pri atomoj, molekuloj, eroj k.s.) Kunteniĝi pro reciproka altiro: *la grajnetoj de argilo koheras.*

koment/i. Komentarii. Prezenti rimarkon, opiniesprimon aŭ klarigon (pri okazaĵo, eldiraĵo k.s.): *li komentis, ke tio estas rimarkinda; ŝi tute pravas, komentis apudstarante; la funkciulo rifuzis komenti pri la propono; komenti novaĵon; komenti decidon; komenti pri ideo; komenti pri libro; komentita Korano* (= prinotita Korano). **Koment/o 1** Ago komenti. **2** Rimarko, noto, vorto de komentinto. **Koment/ar/o.** Komentario. Kolekto aŭ serio da komentoj **2**, precipe tiaj, kiuj celas komprenigi la

malfacilaĵojn de teksto aŭ verko: *eldono de Korano kun komentario.*

kompakt/a. Tia, ke ĝiaj konsistigaj eroj estas tiel malvaste aranĝitaj, ke ĝi plene okupas sian volumenon, sen kavoj, poroj aŭ truoj, kio malhelpas penetron de ekstera objekto en ĝin: *kompakta amaso; kompakta grundo; kompakta pulvoro.*

komput/i. Plenumi algoritmon aŭ programon, precipe per aŭtomata rime-do (komputilo). (La gramatika objekto, se ĝi ĉeestas, indikas celatan rezulton: *komputi la paskodatojn.*) **komput/il/o.** Maŝino por aŭtomata komputado. **komput/o/scienc/o.** Scienco pri komputado, precipe pri la aŭtomata komputado per komputiloj.

kondom/o. Elasta kaj tre maldika (kaŭĉuka) ingo tenata sur penisio dum seksumado por malebligi gravediĝon kaj infektigon.

konekt/i. Kunigi, interligi objektojn tiel, ke ili funkcii kiel partoj de unu tuto (de cirkvito, de komputila aŭ telefona reto ktp.): *ŝi konektis la komputilon kun la poŝtelefono per kablo; tiu aparato funkcias konektite (al la Interreto, al komputilo), dum ĉi tiu, senkonekte* (= aŭtonome); *ĉi tiu kablo konektas partojn de la cirkvito; la paciento estas konektita al artefarita reno.* **konekt/o 1** Ago konekti, konektado. **2** Stato esti konektita, konektiteco: *mi havas (ret)konekton; konekto mankas; la konekto perdiĝis.* **mal/konekt/i.** Ĉesigi, rompi konekton: *malkonekti aparaton.*

kooperativ/o. Societo posedata kaj regata de siaj membroj, kaj celanta helpi al la (ekonomiaj) bezonoj de la membroj per komuna entrepreno.

kramf/o. Forta kaj dolora neintencata kuntiriĝo de muskolo, momenta aŭ daŭra.

kromosom/o. Fadeneto el biologia hereda materialo, precipe genoj, troviĝanta en la ĉeloj de organismoj (ordinare en la ĉelkerno): *homoj havas 23 parojn da kromosomoj.*

ku/o. La litero Q, q.

kurz/o 1 En borso (aŭ borsosimila negocado) konstatita referenca prezo de valorpapiroj, valutoj aŭ varoj: *kurzo*

de akcioj; kurzo de nafto; kurzo en la nigra merkato. **2** Relativa valoro de du valutoj: *la hodiaŭa kurzo de eŭro estas 1,33 dolaroj.*

kvaker/o. Ano de la Societo de Amikoj, dogme liberala eklezio estiĝinta en Britujo en la 17a jarcento, en kies diservaj kunvenoj silenta meditado havas gravan rolon, kaj kiu estas konata ankaŭ pro sia socia helpo-agado kaj pacismo.

kvorum/o. Difinita minimuma nombro de partoprenantoj en kunveno, necesa por validigi ĝiajn decidojn.

lanĉ/i 1 Enuzigi (ŝipon, veturilon k.s.) je la unua fojo: *lanĉi ŝipon* (= enakvigi ĝin unuafoje post la konstruado); *lanĉi sateliton.* **2** Prezenti (varon, verkon, ideon k.s.) je la unua fojo al publika uzado: *lanĉi gazeton; lanĉi romanon; lanĉi kampanjon; lanĉi novan vorton.*

laser/o. Aparato por produkti radion, konsistantan el elektromagnetaj ondoj (ekz. lumo) kun tre mallarĝa spektro kaj sama fazo: *la radio de lasero povas esti tre mallarĝa kaj tre intensa.*

leŭkemi/o. Speco de sangokancero, karakterizata de tro rapida produktado de blankaj sangoĉeloj, kiuj ofte estas nematuraj aŭ misformitaj.

limf/o. Senkolora aŭ flaveta likvo, kiu cirkulas en la korpo, portas nutraĵojn, oksigenon kaj blankajn sangoĉelojn al la ĉeloj, kaj forportas forigendajn materialojn.

magnetofon/o. Sonbendaparato. Aparato por magnete registri sonojn sur bendon, kaj reaŭdigi ilin.

majonez/o. Densa malvarma saŭco el ovoflavo emulsie miksitaj kun oleo kaj ofte kun diversaj spicoj.

majusklo/o. Ĉeflitero, grandlitero. Tia litervarianto (en kelkaj alfabetaj skribosistemoj), kiu estas uzata precipe kiel komenclitero de frazoj kaj de propraj nomoj, ekz. A, B, C, Ĉ. (La malo estas minusklo.) **majusklo/et/o.** Litero (en alfabeto posedanta majusklojn kaj minusklojn) majuskloforma sed malpli alta ol normala majusklo de la sama serio (proksimume samalta kiel la plej malaltaj minuskloj). **majusklo/a 1** Skribita per majusklo(j); rilata al majusklo(j). **2** (en paleografio kaj tipografio, pri signaro) Tia, ke ĉiu signo (escepte de eventualaj kromsignoj) estas skribebla inter du paralelaj horizontaloj: *majuskla signaro; majusklaĵaj ciferoj; kodekso en la majuskla skribo de la kvina jarcento.* Daŭrigota

La astrologia mapo de Zamenhof

En julio 1985 en Belo Horizonte, okaze de la 21a Brazilia Kongreso de Esperanto, Adonis Saliba prelegis pri ĉi tiu temo, kaj lia teksto aperis en *Brazilia Esperantisto* (1985, №287)

Fine de la 1990aj jaroj Jorge das Neves prelegis pri astrologio en la sidejo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, kaj prezentis, kiel ekzemplon, la Zamenhofan mapon kun komentoj. Interalie, li korektis la naskiĝtempon de Zamenhof de 11h25 atm (laŭ Saliba) al 10h56 atm.

En astrologia mapo enestas pluraj informoj. Mia interpreto ne intencas esti kompleta. Mi volas nur elstarigi kelkajn erojn de la mapo, konsiderante konatajn faktojn de la Zamenhofa vivo.

La Suno. Zamenhof naskiĝis la 15an de decembro, do li estis sagitariano. Interalie sagitariano subtenas noblajn ideojn, kiel la universalan amon kaj mondan pacon. Tia estis Zamenhof!

La Suno troviĝas en la deka domo, kio indikas, ke li elstarigis kaj famiĝis en sia medio. Zamenhof, kiu naskiĝis en malgranda urbo de Pollando en 1959 estis deklarita de UNESKO kiel “granda personeco de la homaro”!

Krome la Suno troviĝas en konjunkcio kun Merkuro, indikante ke ni estas antaŭ “vigla pensulo”. Zamenhof kreis ne nur la lingvon, sed ankaŭ la Homaranismon! Tiu konjunkcio ankaŭ indikas ke la sukceso de Zamenhof en la vivo estos ligita al afero, kiu koncernos komunikadon. Ĉu tia ne estas Esperanto?

La Suno troviĝas en triangulo kun Saturno, kio indikas personon respondecan, kies sukceso en la vivo dependas de siaj propraj klopodoj. Ĉu tio ne respondas al la realo?

La Suno estas en kvadrato kun Neptuno. Tio povas indiki personon senteman al suferado. Sed tio ankaŭ signifas, ke li en iu momento povos esti perfidita. Oni ja konas la Beaufront-an epizodon en la vivo de Zamenhof!

La ascensia signo. Krom la suna signo, ni havas la ascensian signon, kiu rilatas al la horo de la naskiĝo. Laŭ tiu flanko Zamenhof estis amforano. “Justeco kaj frateco” estas vortoj, kiujn ni povas “alglui” al ĉiu amforano. Kiu ne memoras la Zamenhofan devizon “justeco kaj frateco inter ĉiuj popoloj”? Krome en la unua domo, kiu en lia mapo estas tre ampleksa, oni trovas la signojn Fiŝo kaj Ŝafo. Fiŝano ĝenerale estas sentema persono. Ĉu Zamenhof ne estis tia? Ŝafano estas iniciatema homo. Ĉu Zamenhof ne agis tiel plurfoje en sia vivo? Krome ŝafano ĝenerale estas homo plena de energio. Ĉu Zamenhof ne estis tia, laborante la tutan tagon en sia konsultejo kaj vespere sub la lumo de kandeloj super Esperantaj aferoj?

La Luno. La Luno en Virgo montras personon kun “deziro esti utila al aliaj”, dum la Luno en la sepa domo indikas ke la kunulino povos esti “sentema persono”. Krome la Luno estas en konjunkcio kun Saturno, indikante ke tiu kunulino povos esti tre respondeca persono. Ĉu ne estis decida faktoro por la apero de Esperanto la sentemo kaj apogo de Klara al la ideoj de Ludoviko?

Neptuno. Neptuno en la unua domo kaj en la signo Fiŝo intensigas la sentemon de la persono. Krome indikas talenton por poezio kaj muziko. Ĉu la vivo de Zamenhof ne konfirmas tion?

Urano. Urano estas konata kiel simbolo de inventemo, originaleco kaj neordinareco. Kaj la tria domo estas la domo de komunikado. La ĉeesto de Urano en la tria domo estas tre interesa afero, ĉar mi pensas ke ĝi estas indikilo ke li iamaniere kreos ion neordinaran rilate al komunikado. Ĉu Esperanto ne estas ĝuste tio? Krome en kelkaj astrologiaj manlibroj estas informo ke tiu pozicio de Urano estas signo de genieco kaj originaleco. Ĉu Zamenhof ne estis tia?

Marso. Marso estas en Skorpio, indikante ke la persono estas laborema kaj disĉiplinita, konscia pri la celoj atingotaj. La ĉeesto de tiu planedo en la naŭa domo indikas, ke temas pri homo kun firmaj opinioj. La aspektoj de Marso kun aliaj planedoj konfirmas tiajn kvalitojn: tre laborema (Marso kvadrato Jupitero), persistema kaj disĉiplinita (Saturno sesangulo Marso) kaj intensa neceso venki iun ajn defion (Marso opozicio Plutono).

Jupitero. Jupitero en Kankro indikas ke li estas bonkora, kompatema kaj protektema rilate al la familio; Jupitero en la sesa domo indikas, ke labori estas plezurige kaj la rekompenco devenas de la servo al la aliaj. Jupitero en trigono Neptuno indikas personon spiritisman, religieman, kiu tre ŝatas helpi la aliajn.


En pluraj lokoj de la mapo oni trovas signojn pri la persistemo, preskaŭ obstinemo de Zamenhof: Luno kvadrato Urano, Ascensia signo en Amforo, Marso sesangulo Saturno, Saturno en Leono, Saturno kvadrato Urano.

Ekzistas kompreneble pluraj aliaj ecoj, trovitaj de mi kaj trovataj de aliaj studemuloj.

Aloísio Sartorato

Nome: ♂ Zamenhof	Horas: 1056	 www.astro.com
naskido a: Qui., 15 Dez. 1859	Tempo Univ.: 9:23:24	
em : Bialystok, POL	Tempo Sid.: 16:30:02	
23e09, 53n09		Titolo: 2.GW. 0.0-1. 26-Okt-2007

Mapa Natal (Método: Web Style / Placidus)
Signo Solar: Sagitário
Ascendente: Aquário



	C	F	M
F	♄	♃	♁
A	♃	♂	♁
T	♂	♂	♁
A	♂	♂	♁

☉ Sol	22 Sag 55'44"
☾ Lua	3 Vir 21' 5"
☿ Merkurio	21 Sag 21' 3"r
♀ Venuso	12 Cap 24'13"
♂ Marto	1 Esc 5'59"
♃ Jupitero	23 Car 31'44"r
♄ Saturno	26 Lea 0'43"r
♅ Urano	5 Gem 0'22"r
♆ Neptuno	24 Pei 23'11"
♇ Plutono	6 Tou 48' 6"r
♁ True Nodo	12 Aqu 16'50"d
♁ Quiron	18 Aqu 52'41"

R:	9 Aqu 35'37"	2: 13 Car 15'1	3: 18 Tou 8'
M:	9 Sag 12'10"	11: 26 Sag 6'12:	13 Cap 38'



La lasta rideto

Novelo de Julian Modest

La patrino de Jana forpasis, kiam Jana estis dekkvin-jara. Jana ankoraŭ memoris kaj neniam forgesos la malhelan januaran tagon, kiam oni enterigis la patrinon. Malmultaj homoj estis ĉe la entombigo: parencino de la patrino, kelkaj najbarinoj kaj du kuzoj de la patro. Kiam la tombofosistoj levis la ĉerkon kaj ekportis ĝin al la tombo, Jana la lastan fojon vidis la palan vizaĝon de la patrino kaj ŝajnis al Jana, ke la patrino ridetas kaj rapidas ekiri al alia, pli bona mondo.

Tiu ĉi penso, kiu subite ekbrilis en Jana en tiu ĉi momento, estis maldeca kaj terura. Jana provis forgesi kaj kaŝi ĝin ie profunde en sia animo, sed ne sukcesis. La penso elnaĝis ĉiam, kiam Jana rememoris la patrinon kaj ŝi kvaŝaŭ vidis denove la rideton sur ŝia pala glacia vizaĝo kaj la deziron de la patrino pli rapide forlasi tiun ĉi mondon. Al neniu Jana konfesis tiun ĉi sian senton.

Kiam Jana kaj la patro revenis hejmen, post la enterigo, Jana longe staris ĉe la fenestro, rigardis la neĝan korton kaj la nigrajn arbojn en ĝi, kiuj similis al altaj nigraj krucoj kaj demandis sin, kiel ŝi vivos plu sen la patrino. La du ĉambroj en la domo aspektis grandegaj, malplenaj kaj malvarmaj.

La patro de Jana, konstrulaboristo, laboris multe kaj klopodis esti kaj patro, kaj patrino, sed li ne ĉiam sukcesis. Ofte li revenis de la laborejo malfrue vespere, sidis antaŭ la televidilo, kaj post kelkaj minutoj klinis la kapon kaj ekdormis. Tiam Jana prenis la malnovan lanan dormkovrilon, kovris lin, estingis la televidilon, la lampon kaj senbrue, fingropinte eliris el la ĉambro.

Iun vesperon en la komenco de junio la patro revenis pli frue hejmen

kaj en nilona saketo portis salamon, ŝinkon, bananojn... Jana rigardis lin mire. Tre malofte li aĉetis tiom da nutraĵo. Kutime li donis monon al Jana kaj ŝi aĉetis ĉion necesan por la nutrado. Nun, antaŭ la vespermanĝo la patro diris:

— Ni sidiĝu kaj parolu.

Jana alrigardis lin maltrankvila. Post la forpaso de la patrino ili malofte konversaciis. Nur vespere de tempo al tempo la patro demandis ĉu ŝi pagis la sumon pro kurento, por akvo aŭ ĉu oni ekzamenis ŝin en la lernejo... Kaj nun li deziris paroli kun ŝi, kaj evidente li preparis sin por tiu ĉi konversacio, ja li aspektis solene kaj feste, kaj ĉio sugestis, ke li serioze deziras konversacii kun Jana. Rigida Jana sidis apud li ĉe la tablo kaj rigardis lin. Korpulenta kun fortaj muskolaj brakoj kaj nigraj kiel karbo okuloj, la patro similis al granda bona urso, iom malrapida kaj konfuzita. Eble por kuraĝigi sin, li verŝis brandon en sian glason, malgraŭ ke li evitis trinki, pikis per la forko peceton da salamo, trinkis iom da brando kaj alrigardis Janan. Ŝi sidis klininta la kapon.

— Post unu monato vi finos la okan klason, — komencis la patro malrapide. — Kion vi deziras lerni plu?

Jana enpensiĝis. Ŝi ne atendis, ke la konversacio estos pri tio. Ja, ŝi deziras lerni plu, sed ankoraŭ ne decidis kion kaj ne povis respondi al la patro.

— Ĉu vi ne pensis pri tio?

— Ne, — konfesis Jana.

— Vi scias, ke mi faros ĉion eblan, por ke vi lernu, kion vi deziras.

— Jes.

— Mi opinias, ke por vi plej bone estos, se vi lernos en la Kemia Tekniklernejo. Poste vi laboros en kemia laboratorio, kie la laboro ne estas malfacila kaj konvenas por knabino. Ankaŭ via patrino laboris tie.

— Bone, — konsentis Jana.

Tiel la patro decidis kion ŝi lernu. Oni akceptis Janan en la Kemia Tekniklernejo kaj aŭtune ŝi estis lernantino. Jana lernis, zorgis pri la domo, la patro laboris kaj havis pli malmulte da

tempo por ŝi. Kiel antaŭe ili preskaŭ ne konversaciis.

Foje nekonata virina voĉo telefonis al la patro.

— Ĉu sinjoro Zafirov? — demandis la virino.

— Jes, — respondis li.

— Mia nomo estas Elenova, mi estas klasestrino de Jana kaj ŝatas, ke ni renkontiĝu kaj parolu pri Jana. Kiam vi povas veni en la lernejon?

— Hodiaŭ, — respondis la patro.

Ĉi-vespere la patro revenis pli frue hejmen kaj Jana tuj komprenis, ke okazis io malagrabla. Lia vizaĝo estis malhela kaj la densaj brovoj ĵetis pezan ombbron sur liajn karbonigrajn okulojn. La patro denove diris, ke li deziras konversacii kun Jana, sed nun li nenion estis aĉetinta, kiel pasintfoje. Ŝi kaj li sidis unu kontraŭ la alia ĉe la malplena tablo.

— En kiu lernejo vi lernas? — demandis la patro.

Jana tuj komprenis, ke li jam ĉion scias.

— En la gimnazio, — respondis ŝi.

— Do, vi ne estas en la Kemia Tekniklernejo?

— Ne. Mi forlasis ĝin kaj mi enskribiĝis en la gimnazio.

— Kiam?

— En la dua semestro.

— Kial?

— La Kemia Tekniklernejo ne plaĉis al mi.

— Kial vi ne diris al mi?

— Mi ne deziris maltrankviligi vin. Ja, vi diris, ke vi faros ĉion, por ke mi lernu, kion mi deziras.

— Jes, mi diris, sed hodiaŭ telefonis via klasestrino kaj vokis min en la lernejon. Mi iris en la Kemia Tekniklernejon, sed tie instruistino, kiu nomiĝas Elenova ne estas.

— Jes, ne estas.

— Diru, kion mi ankoraŭ ne scias pri vi, kaj kial via nova klasestrino Elenova deziras konversacii kun mi.

— Mi ne scias, eble ŝi deziras konatiĝi kun vi.

— Mi esperu, ke estas nur tio. Morgaŭ mi iros en vian novan lernejon, en la gimnazion.

— Bone.

Elenova ne estis juna, verŝajne kvindek-jara, malalta kun arĝentkolora hararo. Ŝi rigardis atente la patron per siaj helaj bonaj okuloj.

— Mi vokis vin, ke ni parolu pri Jana, — diris Elenova.

— Jes, — kapklinis la patro.

— Jana lernas en nia gimnazio de la komenco de la dua semestro. Ŝi bone lernas, ŝiaj pritaksoj estas preskaŭ perfektaj, sed de tempo al tempo ŝi forestas de la lernohoroj. Mi parolis kun ŝi kaj mire mi komprenis, ke tri tagojn en la semajno: merkredo, vendredo kaj sabato, Jana laboras kiel servistino en iu kafejo. Ĉu vi scias tion?

— Unuan fojon mi aŭdas tion, — respondis la patro mirigita.

— Jes, mi supozis. Mi scias, ke via edzino forpasis kaj por Jana estas malfacile konversacii kun vi.

— Ankaŭ por mi estas malfacile. Patrino kaj filino pli facile konversacias.

— Mi provos helpi al vi, — diris Elenova. — Mi admiras Janan. Kiel ŝi havas fortojn lerni, labori, zorgi pri la domo...

— Mi ne scias, — respondis la patro. — Ŝi malofte interparolas kun mi, ŝi estas ege silentema...

— Mi helpos ŝin kaj vin, — diris denove Elenova.

Vespere sur la tablo estis pluraj bongustaj manĝaĵoj. La patro denove verŝis en sian glason iom da brando, pikis per la forko salampeceton, trinkis gluton da brando, alrigardis Janan kaj demandis:

— Kial vi laboras?

— Tio plaĉas al mi, — respondis Jana simple.

— Elenova diris, ke vi bone lernas, sed de tempo al tempo vi forestas de la lernejo.

— Mi ne plu forestos.

— Elenova admiras vin... — kaj la patro ekridetis.

Eble li deziris diri ankoraŭ ion, sed eksilentis. Jana alrigardis lin kaj lia rideto memorigis ŝin pri la pala patrino vizaĝo kaj pri la rideto, kiun Jana kvaŝaŭ vidis sekundojn antaŭ la enterigo de la patrino, kaj nun Jana komprenis, ke tiam la patrino verŝajne deziris flustri al ŝi: “Vi sukcesos. Mi kredas”.

Poemoj de Miĥail Ĥeraskov



Miĥail Matvéjeviĉ Ĥeraskov (1733–1807) estis filo de valaĥa nobelo, veninta al Ruslando por servi Petron la Grandan (kune kun la patro de Antioĥ Kantemir).

En la nobela kadeta lernejo li ekverkis poezion sub forta influo de Sumarokov, kaj post mallonga armea deĵoro li iĝis ŝtatoficisto, i.a., direktoro (1763–1770) kaj kuratoro (1778–1802) de la Moskva Universitato kaj intertempe vicestro de “Bergkolegio” (ministerio pri minaferoj). Aktiva kleriganto kaj framasono, li eldonis revuojn *Utila amuzo* kaj *Liberaj horoj*, proklaminte “gloradon de l’ virtoj” la ĉefa celo de la arto.

Adepto de la rusa klasikismo, Ĥeraskov dum sia duonjarcenta literatura agado verkis ankaŭ lirikaĵojn kun elementoj de sentimentalismo kaj eĉ popolstilan mirfabelon. Famigis lin la heroaj poemoj *Rusujado* (1779), *Renskita Vladimiro* (1785) kaj *Caro, aŭ savita Novgorodo*, multaj dramoj, komedioj, odoj, fabloj kaj mallongaj versaĵoj — du el ili aperas ĉi-sube.

AIKO

* * *

*Agordas liron iuj
Por fami en la mondo
Kaj per ludado dolĉa
Parnasan kronon preni;
Aliun verskreado
Enuon peli helpas;*

*Kaj iu versojn kreas
Por skoldi pri malvirtoj;
Sed mi poemojn kreas
Kaj liron mi agordas,
Ke per muziko mia
Mi plaĉu al amata.*

(1762)

ORO

*Se volas vi — kolektu riĉon,
Konsolon faru por la kor’;
Sed ne observas mi feliĉon,
Alian ulon tentu, or’!*

*Ĉu gloron mi per vi akiras?
Ĉu pace vivos sen envi’,
Se laŭ destino mi sopiras
Kun vi tutsame kaj sen vi?*

*Per or’ ne venas hom’ amika
Al mi, nek saĝo, nek honor’;
Ĝi estas monda plag’ tragika,
Kaŝej’ de morto kaj horor’.*

*Havanta oron hom’ malbravas,
Konstante ĉion timas li;
Sed kiu oron ja ne havas —
Li malfeliĉas multe pli.*

*En or’ serĉatas harmonio;
Havante oron — en sufer’
Ni dronas; plej mirindas tio!
Ho, kiom strangas hom’, en ver’!*

(1768)

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**



La ludoj, kiujn ludas la "esperantistoj"

de Thierry Salomon

Maluniĝo estas malforto

La celo estas kvereli kaj ĉiam trovi kontraŭargumentojn ene de iu grupo. Poste, kiam disigis la grupo, oni rekomencas en la du subgrupoj.

Memkonvinkada ludo

Esperantistoj povas agrable pasigi la tempon dum pluraj horoj konvinkante unu la alian pri la boneco de Esperanto.

Tre ŝatata varianto: fari tion naci-lingve anstataŭ lerni la lingvon.

Ataki la malamikojn

Dum tiu ludo oni kritikis laŭplaĉe la anglan lingvon, Volapukon aŭ Idon.

Kolektado de Flagetoj

Oni kreu retpaĝon pri iu ajn temo. Poste oni traduku ĝin al plej multe da lingvoj (eĉ malnovangla kaj simile) kaj oni nepre aldonu la flagetojn de ĉiuj eblaj landoj.

Mensogi dum varbado kaj elpensi la plej malbonajn varbofrazojn

La celo de la ludo estas plej serioze kiel eble eldiri frazojn kiel: "Eblas lerni Esperanton dum du semajnoj", aŭ "Estas 30 milionoj da esperantoparolantoj".

En la dua parto oni elpensas plej malallogajn sloganojn. Ekzemple: "Esperanto la dua lingvo por ĉiuj", "Esperanto universala lingvo". Gajnas tiu, kiu forkurigas plej multe da interesiĝantoj.

Ludi la gravulojn

Por tiu ludo bezonatas multe da papero kaj tempo. Oni devas organizi multajn kunsidojn dum kiuj oni provu simili al la organizoj kiel la Eŭropa Unio.

Estu multe da burokratismo, pseŭdodemokrateco. Diversaj voĉdonadoj, protokoloj. Oni voĉdonadu por elekti iun, kiu finfine faros nenion.

Dum kongresoj oni povas elekti interesajn temajn programojn kaj ludi "Esperantistoj savos la mondon".

Reformo-ludo

Bona temo por tiu ludo estas la ĉapelitaj literoj, la akuzativo aŭ la sufikso "-in". Eĉ la antaŭa prezidanto de la Akademio de Esperanto ŝategis tiun ludon kaj subtenis alternativan alfabeton.

Nacisma aŭ verdŝovinisma ludo

Temas pri ŝajnigo, ke Esperanto estas lingvo de iu etno aŭ popolo. Oni svingas flagojn, kantas la himnon, uzadas vortojn kiel "Esperantujo/io", "diasporo" ktp... Plej lertaj en tiu ludo estas la membroj de la Esperanto-Civito. Ili jam havas senatanojn, konstitucian ĉarton, konsulojn kaj retejon "esperantio.net".

La junularo partoprenu en tiu ludo per nepra kaj senfina prezentado de la tradicia folkloro danco la "Bambo". Subludo estas krei pli dikajn vortarojn ol tiuj de la naciaj lingvoj.

Eminentaj ludantoj klopodis havi propran monunuon ("stelo") kaj propran teritorion.

Sektumado

Oni bezonas skulptaĵon de la Majstro, fotojn aŭ almenaŭ multajn stelojn. Eblas ludi en la kluboj, aŭ sur la strato dum inaŭguroj de monumentoj.

Sed eblas ankaŭ amuziĝi hejme metante ikonojn de Zamenhof sur la muron.

Plej bone eblas ludi en kasteloj ĉefe en Franclando, kie la sektoj ofte posedas kastelon. Oni ripetadu la mistikan esprimon "interna ideo" kaj "Majstro", "propagando", "fina venko".

Kiel vi vidas, ekzistas multaj ludoj inter kiuj eblas elekti kaj amuze pasigi la tempon anstataŭ okupiĝi pri grizaj enuigaj taskoj kiel terminologio, uzo en la vera praktika vivo (komerco, scienco, turismo).

El <http://interpopolalingvo.inf.hu>

Kontrolo: Kiun ludon ili ludas ?

Esperanto estas taŭga lingvo kondiĉe ke oni sanĝu la ĉapelojn !

Ja Esperanto grave ege gravegas ! Sed stultas vi pri la ĉapeloj !

Mi finlernos na ĝi kiam ĝi konkerintos na la mondo.

Jen la 63.452.623a homo, kiu baldaŭ fuĝos por plu lerni la anglan (eĉ - terure ! - eventuale Volapükon) Ĉar estas 6 miliardoj da homoj en la mondo, el kiuj 30 milionoj da esperantoparolantoj, restas por konvinki 5.906.547.377 homoj. Ni povas ludi plu !



Bildo de Serge Sire

Radikoj kaj branĉoj

Herodoto. *Historio* / Tradukis el la helena Spiros Sarafian. — Ateno: Silloges, 2006. — 623 pĝ., il.

Tiu mikrona kaj giganta (depende de la punkto de la vido) diferenco, kiu disigas la homon de la besto, situas en la fenomeno de *akumulita memoro*. La tute malgranda avantaĝo, se ni prenas ĝin kiel unuaĵon, iĝas kvalite decida ĝuste pro sia multobliga efekto kaj kreas abismon inter tiel similaj mamuloj. La insistaj klopodoj revenigi la homon al la simpla stato de senpera percepto supozas ĝuste la eliminon de tiu akumulita memoro kaj signifas nenion alian ol atakon kontraŭ la esenco de la homo.

Kurta filozofia eskapo ŝajnas al mi necesa por pritaksi la gradon de la graveco de la laboroj de Spiros Sarafian kiu — volumon post volumo — prezentas al ni bazajn kreaĵojn de nia kulturo. Ĉar oni povas senhezite similigi la homon al arbo kies branĉoj sin etendas al futuro kaj kies radikoj serĉas nutron en estinto. Ju pli abundas la radikaro des pli prosperas la arbo. *Pater historiae* Herodoto estas en nia konsidero ne nur objekto de nutra konsumo, suko de nia kultura grundo, sed ankaŭ subjekto, radiko nutranta la trunkon.

Ni ĉiuj ion aŭdis pri Herodoto, estas la okazo de pli proksima konatiĝo. La unua historiisto havis sufiĉe raran ŝancon vivi en Grekujo en la 5-a jarcento aK, amikumi kun Sofoklo kaj Periklo kaj samtempe la helenan triumfon en la milito de du mondoj. La traduko de Sarafian donas al ni eblon rigardi diakrone almenaŭ du problemojn de la plej moderna kultura estantaĵo: tiun de historia aŭtenteco kaj tiun de konflikto de civilizoj.

Herodoto vivis en kultura mondo, kiu riĉe kaj sinteze akumulis sian komunan memoron. Tiu memoro estis kunfando de mitologio, geografio, etnografio kaj propre historio. Evoluo bezonas ja diferencigon, Herodoto estis do la unua, kiu emfazis la lastan — historian — elementon. Kiel li diris mem simple kaj klare, li skribis sian verkon “por ne estu forgesita pro la tempo ĉio, kion faris la homoj”; tiel li donis la komencon al nova scienco kun ĝiaj propraj taskoj kaj objektoj. La separo ne estas ĥemie pura. Ni trovos ĉe Herodoto fabelojn, mitojn, folkloron, geografian kaj etnologian deta-



laron, ni trovos Heraklon apud Temistoklo, amason da orakoloj kaj aŭguraj songoj, kaj ni ne trovos alian historian faktoron krom la volo de dioj. Tio ne estas fatala. La vorto estas dirita kaj ĝi enkorpiĝos en la aferon.

Herodoto ne multe kulpas ke li ne sukcesis ĥemie puran rezulton. Sub la helena suno dioj ŝajnis ne malpli realaj ol luna polvo aŭ elektronoj en la lumo de nia moderna scienco kaj tekniko. (Ĉu vi vidis foje lunan polvon aŭ elektranon? Mi trovis tamen en lia libro fragmenton, kie la patro del historio sin montras iom pretergrunda. Temas pri la katoj de Egiptujo.)

Por ne tro akuzi Herodoton ni rigardu la nuntempajn historiistojn. Iliaj ekstervidaj “leĝoj del evoluo” ne diferencas kardinale de “favoro (aŭ kolero) de dioj”. Sed ilia tro evidenta partianeco ofte faras de la historio blokon de propagandaj komikbildoj, kies kvalito senteble cedas la valoron de antikvaj anekdotoj. Tute male, Herodoto konscie kaj konsekvence aspiras

prezenti ambaŭvidan bildon de la realo. Tia sana strebo donas al li pli da volumeno en la vido de lia esenca objekto. “La batalado inter la helenoj kaj la barbaroj”, la konflikto de la civilizoj, la milito de la mondoj sin apertas antaŭ la okuloj de Herodoto en tuta sia dimensio vere universa. La du kulturaj aksoj estas deklaritaj, — tiujn aksojn ni vidas ĝis nun. La karikaturo paro moderna ne kaŝas la esencon. Usono kaj Irano nur simbolas sur sia (ve, degenera) nivelo la saman kontraŭstaron. (La branĉoj ja velkas, ĉar povras la radikoj.) Kaj, malgraŭ siaj plej ardaĵ simpatioj por kara Helenio nia *pater historiae* demonstras tian estimon rilate al opozaj persaj realaĵoj, kiu aludas certan specialan moralan superecon, se ni komparas lin kun iu samtempa al ni *pater politicae*.

Malkiel lia glora samlandano Sokrato, Herodoto estis fidela partizano de la atena demokratio. Verŝajne tuta lia sperto kaj intuo sugestis al li, ke ekzistas iu firma grundo, sur kiu oni sin apogas por sin senti prava kaj por venki.

Kiel ordinare Spiros Sarafian zorge kaj arte prilaboris la verkon. La antaŭkaj apudkomentoj, la postindikoj nomaj kaj dataj lerte orientigas la leganton necesflanken. “Historio” mem prezentas vere elegantan naŭlibran kolekton, kies partoj markigigas per la nomoj de naŭ Muzoj, tre muzike, miaorele: Kliao, Eŭterpa, Talia, Melpomena, Terpsikora, Eratoa, Polimnia, Urania kaj Kaliopa.

Vi povos senti la tempon kiel veran dimension. Vi povos vidi bildojn simplajn sed stereoskopajn, do donitajn en sia volumeno. Vi trovos aĵojn, kiujn alie vi ne tuŝus. *Sapienti sat.*

Alen Kris

Eta legolibro por geknaboj

Portella, Luiz. *Ŝi estas mia amiko*: [Legolibro] — Braziljo: Pentuvio, 2007. — 38 pĝ., il.

La eta legolibro de Luiz Portella estas verkita precipe por junaj geknaboj, kiuj scipovas legi. En la libreto per dek lecionoj la aŭtoro instigas legantojn por flue legi kaj samtempe informas pri sia patrujo — Brazilo.

Ĉiu leciono fine havas liston de vortoj kun klarigoj. La lecionoj prezentas al la legantoj diversajn situaciojn, ekzemple, *La familio, la amikoj kaj la strato; Novaj lernantoj; Futbalo kaj brilaj okuloj* k.t.p. La libreto taŭgas kiel bona lernilo por 8–14-jaruloj.

Kvankam la verko estas kvazaŭ ilustrita, verajn ilustraĵojn ĝi ne enhavas. Mi opinias ke en la dua eldono la manko estos forigita.

Mi rekomendas la libron de Luiz Portella por legantoj en ĉiuj teranguloj.

Anatolo Sidorov


La tuta libro estas ankaŭ en la reto: <http://lujz.org/amiko/>

Neatendite bela...

Kore. Tielas Vivo: KD. — Donnevill: Vinilkosmo, 2007.

Vinilkosmo publikigis novan muzikan lumdiskon *Tielas Vivo* de la franca grupo *Kore*, kun 11 novaj titoloj kaj ses malnovaj neeldonitaj el la jaro 2000, kiam *Kore* eldonis sian unuan diskon *Kia viv'*. La nuna grupo konsistas el ties kreinto Christian Spitzer (Kris), aŭtoro de preskaŭ ĉiuj tekstoj, gitaristo François Tijou (Fiks), kiu kun Kris aŭtoras la muzikon, kaj multinstrumentalisto David Hadjadj — la du lastaj freŝe kaj riĉe kontribuis al la muzikstila vario kaj impresado de la albumo. Estas ankaŭ neatendite bele, ke la du partoj kvazaŭ pontus inter si.

Estus superflue menciigi ĉiujn stilojn prezentitajn — roko, popo, balado, iuj ĵazecaj kaj bluzaj motivoj. Pli gravas ke la *Kore*-anoj faras ĉion ame, perfekte, elkore kaj pasie. Precipe kaptas la variegecajn kaj riĉajn orkestrajn aranĝojn, krom jen akustikaj, jen peze elektronikaj sonadoj, penetrantaj melodioj kaj ĉirkaŭvolvantaj direktantaj harmonioj, kun striktaj kaj komplikaj ritmoj perkutaj. Je ties fono elstare sonas la energia, pura kaj sonora voĉo de Kris, eĉ kiam sonas rapo, kaj nepru multvoĉeco. Oni mem juĝu pri la teksta enhavo, laŭdire ofte aŭtobiografia, pridiskutenda aparte. Mie, ĉio sonas sincere kaj fande kun la muziko.



En la skatolo oni trovas belan libron kun kanzontekstoj kaj priaj informoj en la lingvoj Esperanta, angla kaj franca. Ie mankas ĉapelitaj literoj, iam ĝenetas abortaj rimoj, iam renkontiĝas ĝis nun nerenkontita vorto (*grondo*).

En la albumo oni ankaŭ trovas 5-minutan videon, preskaŭ ĉiujn titolojn karaokee. Aparta defio estas la versio de la fama kanzono *The Show Must Go On* (Mi brilu plu) de *Queen*, adaptita de Roel Haveman.

Andrej Peĉonkin

Ĉu ĉiam nur reeldoni?

Privat, Edmond. Vivo de Zamenhof / Red., enkonduko, not. Ulrich Lins. — 6a eld. — Rotterdam: UEA, 2007, — 176 pĝ., il.

Estas stulte recenzi la libron kiu havas la sesan eldonon, kiun verkis Edmond Privat, kiu traktas pri la vivo de Zamenhof, kaj pri kiu preskaŭ ĉiuj diris ĉion, aŭ preskaŭ ĉion. Restas al mi do recenzi kelkajn paĝojn de la enkonduko de Ulrich Lins, kiu montras historion de la antaŭaj eldonoj kaj kiu prizorgis la notojn, precipe de la teknika vidpunkto, t.e. kion, kie oni povas trovi en la tiel nomataj fontoj kaj aldonas plenan (plejverŝajne) esperantlingvan bibliografion pri Zamenhof.

Mi ne apartenas al recenzistoj, kiuj serĉas tajperarojn, do mi lasas ĉi tiun entreprenon al aliaj, aldonante, ke efektive la libro bele aspektas kaj estas sendube zorgeme eldonita kun la fotoj, kion ne ĝuis certaj antaŭaj eldonoj.

La enkonduko mem ne enhavas ion speciale novan. Du problemetoj altiris mian atenton. Sur la paĝo 7 frazo: “Kiam aperis la libro, Pollando jam liberiĝis de la rusa superregado kaj denove estis sendependa ŝtato”. Sed Pollando liberiĝis de tri imperioj: Ruslanda, Aŭstra kaj Prusa. Tio ne estas sensignifa detalo de la moderna historio. Ja la tri imperioj havis absolute kontraŭajn interesojn, kion ja konfirmis la unua mondmilito. Mi ne scias, ĉu Ulrich Lins forgesis, ne sciis ktp. Efektive tio estas granda fuŝo de la enkonduko.

Prave substrekas Lins, ke Zamenhof havis nenion komunan kun la mesianismo de Adam Mickiewicz, kiun supozis Privat (pĝ. 8). Fine, tre grava estas memori, kion atestas Waringhien kaj konfirmas Lins, ke Privat estas la unua, kiu kuraĝis diri laŭte pri la judeco de Zamenhof, do pri la vero kaŝita (foje) je la demando de Zamenhof mem je ĝojo de multaj esperantistoj, ĉefe antisemitaj, kiuj ne mankis ĉie, eĉ inter la varsoviaj esperantistoj, kolegoj de Zamenhof. Pro kio, ni scias: inter alie pogromoj en la Ruslanda Imperio, la afero Dreyfus en Francio ktp.

La notoj estas zorge faritaj, kaj tuj oni rimarkas, ke la krestomatia de soci-religiaj verkoj de Zamenhof, *Mi estas homo*, editorita kaj eldonita en 2006 de Aleksander Korĵenkov, konata kiel MEH, konfirmas sian firman pozicion por zamenhofologio.



Kaj tamen io ĝenas min lige kun la recenzo de la verko de Privat. Unue, ke ĝi iel ŝajnas, ke UEA ne forgesis pri Zamenhof okaze de la proksimiĝanta 150a naskiĝtago de Zamenhof (2009), ĉar ja la enkonduko de Lins en la unua frazo preskaŭ enigme komenciĝas per la memorigo de la centa datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. La dua frazo de la enkonduko estas: “Kompreneble, Universala Esperanto-Asocio (UEA) dece festis la okazon”. Post ĉi tiuj liturgiaj vortoj omaĝe al UEA (preskaŭ oni povas kredi ke UEA kreis Dion) sekvas tio, kion mi recenzis.

Diable, pasas 150 jaroj de la naskiĝo de Zamenhof kaj UEA ĝis nun ne strebas mendi ion de zamenhofologio aŭ almenaŭ anonci konkurson pri la verko pri Zamenhof ne por esperantistoj, sed por la vasta legantaro en pluraj lingvoj, kie oni povus montri kion estis Zamenhof, kion li faris kaj kion pensis, sur kiu socia, politika kaj internacia grundoj. Tiu enigmo ne donas al mi la pacon. Simple oni ne ŝajnu, ke oni ion festas!

Mi anoncas konkurson: *Per kiu verko UEA festos la 200an naskiĝtagon de Zamenhof?* La ĝustaj respondantoj turnu sin al UEA: kiel premion ili ricevos la libron de Edmond Privat *Vivo de Zamenhof*, eble kun alia aŭtoro de la enkonduko.

Walter Ŝelazny

Pagante vian abonkotizon por la jaro 2008 bonvolu rememori, ke pluraj neriĉaj personoj volas ricevi *La Ondon*, sed ne havas monon por tio. Helpu viajn samideanojn, aldonante kromsumon por nia Abonhelpa Fonduso.

Dankon!

Ne nur beletra

Per intervjuo kun Jorge Camacho (*LOdE*, 2007, №4) niaj legantoj scias pri la plano de *Mondial* lanĉi *Beletran Almanakon*. *BA-1* ĵus enmondiĝis.

Mondial interkonsentis kun UEA pri aperigo de premiitaj verkoj el la Belartaj Konkursoj, kaj la unua *BA* (176 paĝoj) aperis postkongrese kun la konkursa jar-rikolto. Tiun 70-paĝan kolekton kompletigas raporto de la prezidanto de BK, Humphrey Tonkin.

Pli ol duonon de la volumo konsistigas verkoj eksterkonkursaj. Ili dividigas je similaj sekcioj, kaj oni do havas en la sama kajero po du rubrikajn por la originalaj prozo kaj poezio kaj por eseoj. Originala prozo estas prezentita per noveloj de Luiza Carol kaj Den Drown. Traduka prozo liveras roman-fragmentojn el la islanda (Halldór Laxness / Baldur Ragnarsson) kaj rumana (Mircea Eliade / Ionel Oneț) literaturo. Al la originala poezio kontribuis István Ertl, Dimitrije Janičić, Edwin de Kock, Mao Zifu, Maŭro Nervi kaj Baldur Ragnarsson. Krome, oni trovas poeziaĵojn tradukitajn el la bengala kaj japana lingvoj kaj kvar tankaĵojn, premiitajn en la Esperanta Oomoto-Utafestoj.

Pri evoluo de libera verso (libera linio, laŭ la aŭtoro) meditas Baldur Ragnarsson; Jorge Camacho eseeas pri “Lingvaj manipulistoj”. Nur du recenzoj trovis lokon en la *Beletra Almanako*, kaj nur unu el ili pritraktas verkon beletran — Jorge Camacho funde analizas la unuan poemaron de Mao Zifu *Kantoj de Anteo* kaj agnoskas, ke “ni troviĝas antaŭ poezio eminente universala”. Ni esperu, ke en venontaj almanakoj estos pli da literatura kritiko.

La kovrilon kaj ĉiujn sekciojn ornamas bonegaj fotoverkoj de Güilli Pitarch.

Foliumis por vi **Halina Gorecka**

KTP kantas kaj argumentas

La registara institucio pri kataluna beletro (Institució de les Lletres Catalanes) organizis 28–29 sep konferencon pri poezio kaj kanto kun partopreno de elstaraj roluloj de beletro kaj muziko de la kataluna kulturo.

Mirige, ankaŭ *Kaj Tiel Plu* estis invitita prezenti sian muzikon, kaj nia ĉefkantisto Xavier Rodon prezidis diskuttrondon pri lingva diverseco kaj poezio de la kanto kune kun la elstaraj artistoj Maria del Mar Bonet, Juri Mikaeličenko, kaj Josep Tero.

La impreso de *Kaj Tiel Plu* estis tiel bona, ke kelkaj ĵurnalistoj interesiĝis pri nia agado, kaj tri membroj de la muzikbando estis 29 sep vespere invititaj al *COM Ràdio*, unu el la ĉefaj radioj en Katalunio.

Dum la unua parto de la intervjuo oni plaĉe parolis pri ĉio ajn rilate al nia muziko kaj al nia lingva elekto. La prezentisto, kvazaŭ advokato de la diablo, klopodis diskuti iamaniere la strangan sed altkulturalan faradon de *Kaj Tiel Plu*. Ĉio iris glate, eĉ dum la konektoj al ekstera ĵurnalistoj kiu troviĝis ĉe la koncerto de *Hombres G* kaj poste ĉe la renkontiĝo de rokenrolaj motorciklistoj.

Dum la dua parto de la intervjuo eniris du ĵurnalistoj, kiuj klopodis kontraŭstari. Tiam ni sukcese povis prezenti kaj esperantismen kaj nian idealon pri lingva ekologio.

Kvankam la celo estis paroli pri originala muzikbando kiu interpretas siamaniere muzikon tradician, mezepokan, trobadoran, sefardan ktp. en la originalaj lingvoj kaj en la lingvo internacia, dum la fina parto de la intervjuo, ĉefe pro la malkono de la du aldonitaj ĵurnalistoj, oni faciligis al ni la plenumon de la deziro de ĉiu esperantisto: prezentado de esperantismo kiel ekzistanta socia movado por homaj rajtoj.

Ferriol Macip

OSIEK-premio

Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) ĉiujare premias vivantan esperantiston pro Esperanta verko nefikcia aŭ pro traduko de iu ajn verko. La valoro estas 600 eŭroj. En 2007 la premion ricevis Ĵak Le Puil kaj Armela LeQuint pro la traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino* de Louis-Ferdinand Céline.



La laŭreatoj de la premio

1990: Nomura Rihej (Japanio) pro *Zamenhofa ekzemplaro*

1991: Evaldo Pauli (Brazilo) pro *Mil jaroj de kristana filozofio*

1992: Ebbe Vilborg (Svedio) pro *Etimologia vortaro de Esperanto*

1993: Ulrich Lins (Germanio) pro *La danĝera lingvo*

1994: Rüdiger Eichholz (Kanado) pro *Esperanta bildvortaro*

1995: Donald Broadribb (Aŭstralio) pro traduko de *La Respubliko* (Platono)

1996: Paul Gubbins (Britio) pro *Kunvojaĝu*

1997: Fernando de Diego (Venezuelo) pro traduko de *Cent jaroj da soleco* (García Márquez)

1998: Claude Piron (Svisio) pro *La bona lingvo*

1999: Xie Yuming (Ĉinio) pro traduko de *Ruĝdoma sonĝo* (Cao Xueqin, Gao E)

2000: Trevor Steele (Aŭstralio) pro *Falantaj muroj*

2001: Eli Urbanova (Ĉeĥio) pro *Hetajro dancas*

2002: Krešimir Barkoviĉ (Francio) pro traduko de *7000 tagoj en Siberio* (Ŝtajner)

2003: Gerrit Berveling (Nederlando) pro *Antologio Latina*

2004: Ed Borsboom (Nederlando) pro *Vivo de Andreo Cseh*

2005: Christian Declerck (Belgio) pro *Tarokoj kaj epokoj*

2006: Andre Cherpillod (Francio) pro *Konciza etimologia vortaro de Esperanto*

2007: Ĵak Le Puil & Armela LeQuint (Francio) pro traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino* (Céline)

Madeleine de Zilah



“Persone” reaperas torente

Kun vera miro mi konstatis ke la nova generacio de junaj esperantistoj apenaŭ konas Esperanto-rok-kulturon. En la pasinta FESTO plejparto de ili eĉ ne sciis, kiu estas Martin Wiese (krianta sur la suba foto) kaj *Persone*.



Por junuloj, kiuj aŭskultas repon kaj erenbion kaj aktualajn Esperanto-artistojn, rokmuziko — kaj en tiu kazo muziko de *Persone* — povas aspekti malnova, eksmoda, kvazaŭ muziko por maljunuloj. Jes *Rolling Stones*, *Led Zeppelin* kaj *Deep Purple*, eĉ *Police*, estas ne tiom junaj kaj tamen ĉi-jare reaperis sursceneje post pluraj jaroj de malĉeesto...

Imagu, ke multaj nunaj esperantumantaj junuloj ankoraŭ ne naskiĝis kiam *Persone* faris siajn unuajn paŝojn. Se gejunuloj volas akiri la bazan muzikkulturon, necesas reveni al la radikoj de la rokmuziko, kaj kiam temas pri Esperanto-muziko, tiam la radikoj estas memkompreneble *Amplifiki* kaj *Persone*.

Persone estis, estas kaj estos unu el la plej grandaj referencoj en la Esperanto-muzika mondo kaj ne eblas neglekti la elstaran verkaron de, ni diru, tiu mejloŝtona bando por la kulturo de Esperanto. Por tio necesas fari ioman historian prezenton ...

Persone estis kreita por fari **nur unu koncerton** en la Kultura Esperanto-Festivalo (KEF) en 1986. La ideon naskis Borje Lund, kiu ankaŭ elpensis la nomon *Persone*. La unua provludo okazis 7 mar 1986. Post prova prezento antaŭ amikoj en popola domo en Stokholmo (9 maj 1986) la grupo konstatis, ke ĝi estas matura por vera koncerto. La premiera koncerto okazis 17 maj 1986 en Upsalo dum KEF. Estis sukceso.

Dum la unuaj jaroj *Persone* konsistis el Borje Lund (elektra gitaro, elektra basgitaro, kantado), Martin Wiese (elektra gitaro, elektra basgitaro, kantado), Bertilo Wennergren (drumo, kantado) kaj Per Ola Axelsson (saksofono, kantado). Kun tiuj membroj *Persone* registris kaj eldonis sian unuan albumon *62 minutoj* en 1987.

Necesas emfazi ke en tiu konsisto estis muzikistoj kiuj venis el *Amplifiki* — la unua vera rok-bando internacia, starigita okaze de junularaj aranĝoj kiel IS kaj IJK.

En la unuaj jaroj de *Amplifiki*, krom Micke Englund (gitaro), Kim Henriksen (klavaro kaj kanto), la knabinoj Aline Boulet kaj Isabelle Rome (kanto) ankaŭ ludis ĉe akustika gitaro kaj kanto Martin Wiese kaj ĉe basoj kaj kanto Bertilo Wennergren; ĉiuj tre junaj esperantistoj aktivaj en la junulara movado.

En IJK de Kerkrade en 1989 *Amplifiki* faris unu el siaj lastaj koncertoj, sed ankaŭ *Persone* kun Borje Lund kiel gitaristo/kantisto.

Ekde 1999 Anders Grop (basisto), ankaŭ el Stokholmo, venis en la bandon kaj kun Martin kaj Bertilo, la nova *Persone* registris kaj eldonis sian duan albumon *En la spegulo*.

En 1994 okaze de koncerto en Stokholmo *Persone* eksperimentis por unuafoje akustikan koncerton kun du akustikaj gitaroj (Martin kaj Bertilo) kaj kontrabaso (Anders). De tiam la grupo estas duvizaĝa: kaj elektra rok-bando kaj akustika parte roka parte kanzona grupo.



En 1996 la grupo aperigis sian trian albumon *Povus esti simple*, la unuan fojon en la formo de K-disko. Tiu disko entenas la kanton *Reĝoj de cindro*, kiu aperis la antaŭan jaron en la unua volumo de *Vinilkosmo-Kompil'* sed en alia versio.

Komence de 1999 aperis la kvara albumo *...sed estas ne*, K-disko eldonita de EUROKKA (Vinilkosmo) kadre de la projekto *Kolekto 2000* (la tria disko de la kolekto).

En 2001 Anders kaj Bertilo transloĝiĝis al Germanujo — Anders al Berlino (en la nordo), kaj Bertilo al Tübingen (en la sudo) — dum Martin plu loĝas en Stokholmo. Pro tio *Persone* nun malmulte aktivas. Sed tamen...

Meze de 2002 aperis la longe atendita kvina senelektra (akustika) albumo: *Sen* eldonita de *Vinilkosmo*.

Persone ludis siajn lastajn koncertojn somere de 2000 en KAFE (Tuluzo) kaj en KEF (Helsinki). Poste Bertilo translokiĝis al Koreio, kaj tiel disigita (Anders en Berlino kaj Martin en Stokholmo) la bando ne plu havis eblecon kune ludi.

Pro maloftaj ekzercadoj kaj koncertoj de *Persone* en 1996 Martin komencis labori sola kaj tiel li aperas en la dua volumo de *Vinilkosmo-Kompil'* per la akustika kanto *Vivo duras sed vi molas*.

Post kelkaj jaroj Martin eklaboris por eldono de solo-albumo kun akompano de stokholmaj muzikistoj *La Talpoj*. Parto de tiu disko estis registrita en Stokholmo, kaj kelkaj aldonaj voĉoj kaj gitaroj kaj miksado okazis en la studio de *Vinilkosmo*. La nova albumo *Pli ol nenio* sub la artista nomo *Martin & la talpoj* aperis komence de la jaro 2007.

Hodiaŭ la bando *Persone* daŭre paŭzas (ni ne parolu pri vera disiĝo) kaj la diskoj *...sed estas ne* kaj *Sen*, eldonitaj de *Vinilkosmo* ankoraŭ disponeblas. Sed, bedaŭrinde, la unuaj diskoj kaj kasedo jam de longaj jaroj elĉerpiĝis.

Por la unua fojo en Esperantio la tuta albumo *En la spegulo* kaj ankaŭ la tuta albumo *Povus esti simple* estas nun haveblaj senkoste kiel torente (per la programo “BitTorrent” k.s.). La torente enhavas la tutajn albumojn kiel wav-dosierojn kun plena K-diska kvalito. Rimarku, ke tio ankoraŭ estas iom eksperimenta. Estu do pacienca.

Persone havas retejon en kiu vi trovos ĉiujn informojn por elŝuti tiujn du diskojn: <http://bertilow.com/persone/prezento.html>

Se vi estos paciencaj kaj vivos sufiĉe longe, ne maleblus ke iam *Persone* revenos por surpriza koncerto ie sur la Esperanta scenejo...

Kompilis por vi **Flo!**

“Spegulo”: vastigi la pens-horizontojn



En la nova jaro 2008 en Pollando komencos aperadi *Spegulo* — kvaronjara revuo kun socikultura enhavo. Ĝin redaktos la pola kvaropo: Tomasz Chmielik (ĉefredaktoro), Kazimierz Leja, Lidia Lięza kaj Stanisław Śmigielski (sekretario). Inter la kunlaborantoj estos Zbigniew Galor, Malgorzata Komarnicka, Ilona Koutny, Teresa Nemere kaj Ryszard Rokicki. Atendataj estas ĉiuj samideanoj, kiuj volos pliriĉigi la novan revuon per siaj kontribuoj.

Spegulo estas turnita al leganto aktiva, lingve matura, kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo, eŭropa kaj monda. Enestis en ĝi originalaj poemoj, rakontoj kaj teatraĵoj, kaj tradukoj el diversaj lingvoj. Ni ne volas forgesi la historion de la Esperanto-movado, en kiu ni serĉos imitindajn ekzemplojn kaj indikojn por la estonteco. Interesas nin serioza recenzado de verkoj aperintaj en Esperanto, kaj recenzoj devus analizi la literaturan valoron de tiuj verkoj, ilian lokon en la literatur-historia perspektivo. Multe da atento ni volas turni al la signifoplenaj eventoj kaj aĵoj en la arta vivo. Ni volas eliri el la verda “geto” kaj interparole kontakti elstarajn personojn de la kultura vivo.

Nin ĉiujn ligas la komuna sperto de la memorinda jaro 1989 — annus mirabilis — kaj ĉiuj ŝanĝoj, kiuj okazis en la politika kaj socia vivo, kiam finiĝis la komunista regado kaj formiĝis novaj ŝtatoj en la Meza kaj Orienta Eŭropo. Tial ni volas montri al legantoj la gravecon kaj signifon de la jaro 1989 kaj la sekvon por ni, kiel parto de Esperantujo.

Ni deziras, ke *Spegulo* estu malferma, sen limigaj antaŭkondiĉoj aŭ tendencoj. Ĉiel ni klopodos, por ke Esperanto fariĝu perilo inter homoj kun diversaj opinioj, kun malsamaj spertoj. Per *Spegulo* ni intencas konvinki Esperantistojn, ke la Zamenhofan lingvon ili lernas kaj praktikas ne nur por kongresumi kaj plumamikadi, sed ankaŭ por vastigi siajn pens-horizontojn.

La unua *Spegulo* sur 64-paĝoj A5 aperos meze de marto. Abonebla kontraŭ 18 eŭroj. En Pollando: 45 zlotoj. Pliaj detaloj ĉe la ĉefredaktoro: tchmj@wp.pl.

Tomasz Chmielik

Ricevitaj libroj

Herodoto. *Historio* / Trad. el la helena, enkonduko Spiros Sarafian. — Ateno: Silloges, 2006. — 623 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

Lejzerowicz, Izrael. *El la “Verda Biblio”* / Postpar. Tomasz Chmielik. — 3a kompletigita eld. — Czeladź: Hejme; Świdnik: Libro-Mondo, 2007. — 88 pĝ.; il. — [Donaco de Hejme].

Portella, Luiz. *Ŝi estas mia amiko*: [Legolibro]. — Braziljo: Pentuivio, 2007. — 38 pĝ.; il. — [Recenzoekzemplero].

Privat, Edmond. *Vivo de Zamenhof* / Red., enkonduko, not. Ulrich Lins. — 6a eld. — Rotterdam: UEA, 2007. — 176 pĝ.; il. — [Recenzoekzemplero].

Глобализация — языки малого распространения — интерлингвистика: ситуации и проблемы. В 2-х ч. Ч. 1. Статьи на русском языке с резюме на чувашском / Отв. ред. А.С.Мельников. — Ростов-н/Д: Изд-во РИНЯЗа, 2006. — 156 с.; 150 экз. — [Aĉeto].

Глобализация — языки малого распространения — интерлингвистика: ситуации и проблемы. В 2-х ч. Ч. 2. Статьи на языке эсперанто. Литература / Отв. ред. А.С.Мельников. — Ростов-н/Д: Изд-во РИНЯЗа, 2006. — 116 с.; 150 экз. — [Aĉeto].

Marček, Stano. *Эсперанто прямым методом* / Перевод с эсперанто Бронислава Чупина; Илл. Линды Марчковой. — Martin: Marček, 2007. — 114 с., илл. — (Donacoj de Bronislav Ĉupin kaj de Stano Marček).

Ricevitaj gazetoj

Esperanto USA, 2007/3-4; Esperanto aktuell, 2007/5; Esperanto sub la Suda Kruco, 2007/6; Esperanto, 2007/11; Heroldo de Esperanto, 2007/13; KAE-Infornilo, 2007/60; La Ondo de Esperanto, 2007/11; La Revuo Orienta, 2007/10,11; La Sago, 2007/38; Literatura Foiro, 2007/229; Monato, 2007/11; Norvega Esperantisto, 2007/5; Pola Esperantisto, 2007/5; Sennaciulo, 2007/9; Service de Presse, 2007/38; Zagreba Esperantisto, 2007/4.

Gazetoj

Literatura Foiro, 2007, №229

Literatura Foiro proponas al siaj abonantoj buntan lego-materialon en la numero 229.

En la Goldoni-jaro Carlo Minnaja tradukis la komedion *La kafejo*, kies unua akto premieras en la oktobra numero. Aldonas Paul Gubbins: itala spirito kun nordangla akĉento.

Vinko Ošlak prezentas la Verkon de la Jaro por 2006: *Hodler en Mostar* de Spomenka Štivec. Fakte Štivec estas unu el la selektotaj kandidatoj de la Esperanta PEN-Centro por la literatura Nobel-premio. La abonantoj de *Literatura Foiro* referendumo elektos la esperantan kandidaton: eblas eĉ elekti alian nomon, ekster la selektotaj.

Radojica Petrović recenzas la libron *La frakseno Igdrasiljo*, antikva dia historio de Alf Henrikson kaj Edward Lindahl, kiun tradukis Bertil Nilsson. Inter la originalaj literaturaĵoj estas la duaj premioj en la konkurso EKRA-2007: uverturo *Obei* de Christian Rivière kaj *Hajko-spritaĵoj* de Zorka Vinceljak. La traduka ĝenro estas traktata per eseo de Giorgio Silfer.

Silfer gastas ankaŭ en la kutima kino-rubriko (la sola ekzistanta en Esperantio): *La eta knabino*, okminuta filmo realigita antaŭ dek jaroj fare de Samir, laŭ rakonto de Jörg Schubiger, estis en la afiŝo de la internacia kinfestivalo de Lokarno pasintan aŭguston.

Kio estas Har-Magedono? Al la demando respondas Dimitar Haĝiev. En la oktobra numero de *Literatura Foiro* daŭras la esploro pri vivo kaj didaktika kontribuo de Louis de Beaufront: en la kvina parto Claude Gacond komparas verkojn de la tiama epoko. Ja antaŭ cent jaroj eksplodis la Idoskismo, bona okazo reveni al la pionira epoko.

HeKo

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENSIFA
La mondo iĝas por vi malpli kosta!
Nun vi povas malfermi vian mondon kaj ricevi la magazinon MONATO dum 3 monatoj senpage.
Por pliaj informoj kaj kondiĉoj vizitu: www.monato.net
aŭ skribu al MONATO
FLANDRA ESPERANTO-LIGO
FRANKRIJKLEI 140
B-2000 ANTWERPEN, BELGIO
FAXE: +32 3 233 54 33
RETE: MONATO@FEL.ESPERANTO.BE

Por la tasko *Ora skvamo* venis 12 respondoj, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Erkki Kemppainen, Bruno Lehtinen, Aira kaj Erkki Röntynen (Finnlando), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Pere Palà (Hispanio), Ester Olsen (Norvegio), Jadwiga Benicka, Dorota Burchardt, Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski (Pollando), Klara Ilutoviĉ (Ruslando), Mihailo Nešić (Serbio).

La loto donis libropremion al **Aira kaj Erkki Rontynen**. Ni gratulas!

La ĝusta respondo: **Horizontale**. 5. Italo; 7. Likv'; 8. Reni'; 9. Agres'; 12. Olda; 15. Lori'; 17. Norvegi'; 18. Arda; 19. Medi'; 20. Statiko; 21. Okro; 23. Zink'; 25. Limon'; 28. Agro; 19. Orko; 30. Dinar'. **Vertikale**. 1. Liva; 2. Kapr' (eblas taŭr'); 3. Mors'; 4. Diod'; 6. Ondo; 10. Germani'; 11. Emerito; 13. Larik'; 14. Anaso; 15. Limoz'; 16. Radon' 22. Rigo; 24. Inko; 25. Lodo; 26. Minc'; 27. Nord'.

Dialogo en la kosmo

- Saluton!
- Saluton!
- Kiu vi estas?
- Mi estas Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo. Kaj vi?
- Mi estas unu el la mondcivitanoj. De kie vi venis?
- Mi venis de malproksima planedo Plejo. Ni vivis tie tre feliĉe, sed okazis tragedio en la universo, kaj ni estis devigitaj forlasi nian varman sunan mondon. Ekplodis nia suno, kaj ni, kiuj sukcesis saviĝi, ĉiuj estas dis! En morna vakuo, en la verda raketo, mi solece navigas al aliaj mondoj.
- Ĉu vi konas la teron?
- Ne, tiu nomo diras al mi nenion. Ĉu estas via patrujo?
- Jes. Tio estas tre juna planedo, kaj tie loĝas la infana raso de homoj. Ili estas tiel "freŝaj", ke ankoraŭ ne havas komunan lingvon, kaj uzas, imagu, ĉirkaŭ kvin mil lingvojn! Nu, mi, feliĉe, komprenas ĉiujn.
- Verŝajne, tiu multlingveco estas la tragedio de l' homo?
- Ŝajne, ne. Vere aŭ fantazie, ili vivas senzorge kaj eĉ ne pensas pri tio.
- Nu, tiam ne baldaŭ ili ekiros survoje al universala civilizacio.

Bv trovi en la teksto 12 titolojn de libroj, eldonitaj en Esperanto. La titoloj venu al la redakcio antaŭ 15 jan 2008.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**

Antaŭ 60 jaroj

Salo kaj pipro

Kolomano Kalocsay, kiun iuj nomas "La Danto de Esperanto", verkis ne nur "altan poezion".

En la revuo *Literatura Mondo*, refondita por la tria vivoperiodo antaŭ sesdek jaroj en Budapeŝto, li verkis satirojn, tipajn por la postmilita gazetaro en la Orienta Eŭropo. Vidu ekzemplon en la rubriko *Salo kaj pipro*.

La apuda bildo estas fragmento, prenita el la *Arĝenta Duopo* (Budapest, 1937).



SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

Ĉiun esperon lasu ĉe la kurso

Ĉiu kapablas traduki, bone aŭ malbone, la *Dian Komedion*, sed aranĝi kurson en sia urbo... estas io ege pli malfacila... (Renato Corsetti. *Ni estas ĉefe fabriko de esperantistoj // L'Esperanto*. 2007, sep/okt, pĝ. 3; rimarkis Mauro Nervi)

Pelis lin malsat'

Kunlaborinto ankaŭ de periodaĵoj "Ekzakte", "Hungra vivo"... (Josip Pleadin. *Ordeno de verda plumo*, pĝ. 147, pri Nikolai Lozgaĉev; rimarkis Sten Johansson)

Pozi-tiva opinio

La leksikonon ni konsilas akiri, pozi ĝin inter la gravajn kaj prestiĝajn librojn de kaj pri la Esperanto-kulturo kaj uzi ĝin kiel eble plej multe. ("Nia opinio" pri *Ordeno de Verda Plumo*, <http://www.edukado.net/katalogo/18539>)

Se ne estus Soc. kaj zame, mi al ĉio dirus hof

Ĉu vi estas membro de Societo Zamehof? (*Esperanto*, 2007, №10, pĝ. 194)

Francaj sciencoj

Sukcesinta la plej altan konkurson pri intruado de la franca nacia edukadosistemo... (<http://eo.wikipedia.org> pri Léopold Sédar Senghor, stato 22 okt 2007)

Fek', tro fie

Ĉina nutradisto Jiang Jianping diris, ke karencio kaj supernutrado ĉiu kaŭzis kakotrofon, kiu jam rekte afekcias sanstaton de la ĉina publiko. (Iom pri nutra stato de ĉinaj loĝantoj, 22 sep 2007, <http://esperanto.cri.cn/341/2007/09/22/1@70163.htm>)

Duodene kaj bonvene

Bov-enaj estas novaj redaktoroj por la literatura rubriko... (*FEN-X*. 2007, №3-5; rimarkis Ionel Oneț)

Ve al la popolo peka!

Bonveus ankaŭ informoj pri gravaj decidoj de diversaj komitatoj. (Jukka Pietiläinen, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3038>, 2 mar 2007)

Plukis **István Ertl**

Disciplino

Okazis foje al germano
En varma tago de somero,
Ke ekdeziris li per bano
Sin refreŝigi en rivero,
Li siajn vestojn do demetis,
Plezure sin en akvon jetis,
Kaj naĝis gaje kiel fiŝo,
La ondoj lin karesis flate,
Sed jen — li legis sur afiŝo:
"Naĝi estas malpermesate
Ĉi tie!" Kaj li tuj obeis:
Ne naĝis, dronis kaj pereis...

Por ke ni tiru ĉe la fino
Konkludon el ĉi akcidento:
Tre bona estas disciplino,
Ne manku tamen la prudento!
Literatura Mondo, 1947, №7-8.

Perantoj de "La Ondo de Esperanto"

Argentino: Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

Aŭstrio: Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia, DF 70084-970

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, "Nadejda" V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: Jozefo Baksa, Pf. 115, HU-8901 Zalaegerszeg KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

Pollando: PEA (la konto estas anoncota)

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Pollando. Universitato de la Tria Aĝo en Nowy Sącz okazigis en oktobro *Polan Oran Aŭtunon*, kiun partoprenis lokaj esperantistoj inkluzive de ĉina samideanino Xu Xiao Nan, kiu studas en Pollando. Ŝi, kun la verda standardo, faris la unuan montgrimpadon en sia vivo. (Halina Komar)



Ruslando. En la marurbo Soĉi, en plaĝ-kafejo *Morskaje* deĵoras esperantisto kaj kantisto Sergej Sergejeff. 28 okt 2007, en la lasta tago de la Esperanto-Tagoj de Soĉi, Sergej gaje salutis nin en Esperanto kaj dum la tuta vespero kantis por ni en la Lingvo Internacia. (Vladimir Bepalov)



Esperanto-urbo Herzberg. La unuan novembran semajnfino kunvenis la estraroj de la Pola kaj Germana Esperanto-Junularoj. Krome partoprenis Rolf Fantom (BEJ, Britio) kaj Thomas Dresler (Skolta E-Ligo). Krom laborprogramo okazis ekskurso kaj akcepto en la urbodomo ĉe la urbestro Gerhard Walter kaj sekciestro Michael Nienstedt. (Peter Zilvar)




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA KUNULARO DE L' RINGO

Tolkien J.R.R. *La Kunularo de l' Ringo*.
La unua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
464 paĝoj, 30 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ

Tolkien J.R.R. *La du turegoj*.
La dua volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
368 paĝoj, 27 eŭroj.




J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA REVENO DE LA REĜO

Tolkien J.R.R. *La reveno de la Reĝo*.
La tria volumo de *La Mastro de l' Ringoj*.
328 paĝoj, 24 eŭroj.



Georges Simenon. *La flava hundo*.
La kvara Esperanto-libro pri komisaro Maigret.
120 paĝoj, 12 eŭroj.

Je la Tago de la Libro en via kutima libroservo